Lumo

KEA

Aprilo 2026



Renkontu
Alekson Miller

Dek Tagoj en
Toronto

Bonvenon al
Granbeo

Kiu Estas...?
Wally du Temple

Lumo estas la oficiala Esperanta revuo de la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) — la nacia neprofitcela organizaĵo, kiu antaŭenigas Esperanton en Kanado.

Sekvu la lastajn novaĵojn de Esperanto Kanado

Kanada Esperanto-Asocio
La estraranoj de KEA dum 2026–2027:

Prezidanto: Geoffrey Greatrex — Otavo ON
Kasisto: Jordan Zero – Newmarket ON
Sekretario: Bob Williamson — Halifakso NS
Estrarano: John Huang, Mississauga ON
Redaktoro: Garry Evans — Montrealo KE
Estrarano: Ĵenja Amis — Montrealo KE
Estrarano: Andrew (Andreo) Sly — Viktorio BK
Estrarano: Luis Obando – Revelstoke BK
Estrarano: Trefleo Mercier – Ŝerbruko KE

Redaktoroj: Garry Evans, Luis Obando
Dezajno: Daniela Obando
Enpaĝigo: Daniela Obando, Luis Obando, Viviana Castro
Provlegantoj: Bob Williamson, Francisko Lorrain, Silvano Auclair, Trefleo Mercier
Fotoj: John Huang kaj aliaj
Artikoloj: Pluraj aŭtoroj

Lumo
Publikigite kvaronjare
Farita en:
Aprilo 2026

Enhavo

4 Kiu estas Wally Du Temple?
7 La Kreado de Testud-insulo
8 Renkontu Alekson Miller, la ricevinto de la Premio Maertens 2026!
12 Recenzo: Naskitaj sur la ruino de Miyamoto Masao
14 Inter algoritmoj kaj homoj: kiel KEA repensas sian komunikadon
15 Esperanto en Saskaĉevano
16 Bonvenon al Granbeo (Granby)
17 VARIE ĉiam varias
18 Esperanto en Kanado
19 Kunmetita interezo, la oka mirindaĵo de la mondo
20 Dek tagoj en Toronto, vivo en Esperantujo
22 Renkontu Irène Ellenberger







Letero de la **Redaktoroj**

Garry Evans kaj Luis Obando

Komenciĝas nova epoko por *Lumo*, revuo kiu ekzistas ekde 1902. Post longa periodo de redaktado, Ĵenja Amis decidis forlasi la postenon pro sia okupiteco pri aliaj aferoj en Esperantujo kaj en la “reala mondo”. La postenon nun transprenis Garry Evans kaj Luis Obando.

Ni tute ne povas imiti la elstaran kaj senlacan laboron de Ĵenja, kiu ĉiam preparis buntajn kaj ampleksajn (ofte eĉ centpaĝajn) numerojn de la revuo. Ŝi havis vastan sperton pri Esperanta ĵurnalismo, laborinte kiel redaktoro de *Kontakto* inter 2002 kaj 2007.

Tamen ankaŭ ni havas grandajn ambiciojn por la revuo. Ni intencas eldoni ĝin laŭeble regule, komence de januaro, aprilo, julio kaj oktobro ĉiujare, sed kun malpli da paĝoj ol en pasintaj jaroj. Ni enkondukis kelkajn regulajn rubrikojn:

- **Kiu estas?** (intervjuo kun konata kanada esperantisto — ĉi-foje Wally du Temple);
- **Recenzo** de nia bibliotekisto pri unu el la libroj de KEA kaj ESK;
- Raporto el unu **el la lokaj kluboj** en Kanado (en tiu ĉi numero: Saskaĉevano, kie estas nur unu membro!);
- Raportoj pri lastatempaj **eventoj** (ekz. VARIE kaj laborsesio pri strategio kun Heather Eason).

Sed, eble plej rimarkinde, ni decidis presi la revuon — jes, eldoni ankaŭ tradician paperan version. Ĉiuj membroj ricevos la aprilan kaj julian numerojn de *Lumo* en 2026 en papera formato. Poste ni petos tiujn, kiuj volas daŭre ricevi la paperan version, pagi modestan kotizon (la reta versio kompreneble restos senpaga). La celo estas pli videbligi la revuon — kaj Esperanton en Kanado. Lasu la revuon (laŭ ni, tre belaspektan!) sur via kafotablo por surprizi viajn vizitantojn.

Fine, ankoraŭ unu grava afero. Multaj el ni maltrankviliĝas pro la malvigliĝo de Esperanto en Kanado (kaj en la mondo). Legu la debaton pri tiu temo en ĉi tiu numero. La estraro de KEA havas multajn ideojn por pli allogi membrojn al planataj eventoj kaj por altiri novajn interesitojn al Esperanto. Sed por tio necesas pli da financaj rimedoj — por organizi kampanjojn, dungi studenton dum la somero, reklami nian agadon, ktp.

Bona maniero subteni tion estas donaci monon al KEA aŭ ESK per via testamento. Ne temas pri giganta sumo — eĉ kelkaj miloj da dolaroj povas signife helpi la asocion post via forpaso. En la sekva numero de *Lumo*, ni klarigos kiel strukturi aŭ modifi vian testamenton por inkluzivi tian donacon.

Ĉu vi ŝatas *LUMON*?



KEA nun decidis presi sian revuon *Lumo*, do ĉiuj KEA-membroj ricevos ĝin 4 fojojn jare, ĉiuj ricevos la du unuajn presitajn numerojn tute senpage, kaj post tio nur Membroj Abonantoj (nova kategorio) ricevos la paperan revuon, kaj Bazaj Membroj ricevos ĝin nur en PDF-formato.

Vi povas kontribui al *Lumo* per verkado! Simple verku mallongan artikolon kiu interesos kanadajn esperantistojn kaj sendu ĝin al ni per:

lumo@esperanto.ca

Ĉiuj aprobitaj artikoloj publikiĝos en nia retejo, kaj la plej bonaj aperos ankaŭ en la presita *Lumo*.

Intervjuoj

Kiu Estas...?

Wally Du Temple

Intervjuita de Garry Evans



Wally, 23-jaraĝa

Vi estis prezidanto de KEA, redaktoro de *Lumo*, vi aranĝis diversajn eventojn, inkluzive de kanadaj Esperanto-kongresoj. Ĉu vi povas paroli pri tiaj agadoj, aparte en la 1970-aj kaj 1980-aj jaroj?

Mi komencis aktivi pri Esperanto oficiale eble en 1966, kiam mi instruis en la mezlernejo Bell's Corners en Otavo. Estis en tiu tempo, ke mi perfektigis mian Esperanton en klaso de pastro Boglari, hungara katolika pastro, kiu venis al Otavo por anstataŭigi la mortintan pastron.

Mi tuj komencis labori en la centra oficejo de KEA, kiu en tiu tempo troviĝis ĉe Sparkstrato en Otavo. Lorcán Ó hUiginn tiam estis la prezidanto de KEA.

En tiu tempo oni laboris per tute malnovaj metodoj. Ni presis *Lumon*, kaj tiam la kovertoj devis esti adresitaj per maŝino, en kiun oni metis la individuajn literojn por la nomoj.

Surprizas min, ke estis eĉ oficejo de KEA. Kiom da homoj laboris aŭ volontulis tie?

Tri aŭ kvar tiutempe. Estis Lorcán kaj Kirk Crockett — ili ambaŭ estis raportistoj en la Senato por Hansard. Ankaŭ Guy Matte, kiu volontulis eble iom pli poste, kaj kelkaj aliaj.

Vi organizis Kanadan Kongreson de Esperanto en 1972 en Viktorio. Mi vidis foton, kaj estis plurdekoj da partoprenantoj. Kiaj estis la Kanadaj Kongresoj en tiu epoko?

Jes, eble 150, eĉ 200 homoj venis. En tiu tempo, mia klubo en Viktorio kaj la klubo en Vankuvero estis la plej grandaj en Kanado. Do la lokaj esperantistoj, kompreneble, helpis la kreskon de la nombro de partoprenantoj. Nia klubo en Viktorio havis 40 membrojn en tiu tempo.

Vi estis ankaŭ prezidanto de KEA en la 1970-aj jaroj. Kion vi faris? Aŭ kion vi ŝanĝis kiel prezidanto?

Mi memoras unu kampanjon, kiun ni havis. Mi konvinkis la estraron, ke ni devas sendi paperan dosieron al ĉiuj bibliotekoj en Kanado. Tio estis en tempo antaŭ la reto, kompreneble, do ĉio iris per poŝto. Ĉiuj bibliotekoj tiam havis specialajn dosierojn pri interesaj temoj, kaj do ni sendis 15-paĝan informilon pri Esperanto al ĉiuj bibliotekoj. Tio estis sufiĉe granda entrepreno, pro la kosto de la poŝto kaj la enkovertigo. Ni poste ricevis dankojn de multaj el tiuj bibliotekoj, kaj ili promesis meti la flugfoliojn en la informservon de la biblioteko.

Alian fojon ni sendis leteron al ĉiuj membroj de la Kanada registaro en Otavo pri Esperanto, petante ilian opinion. Ni ricevis eble 30 respondojn.

> **"Oni devas lukti ĝis la lasta momento por amo, kunlaboro kaj la plua evoluo de la homaro."**

Ankaŭ vi sukcesis organizi ian oficialan kurson pri Esperanto, kiun aprobis la Ministerio pri Edukado. Parolu iomete pri tio.

Mi okupiĝis multe pri politiko ekde juna aĝo. Mi laboris longan tempon ene de la Verda Partio, sed komence mi estis en la Liberala Partio. Do mi konatiĝis kun la Ministro pri Edukado, Patrick McGeer, kaj sendis al li informon pri Esperanto, kaj konvinkis lin krei kurson pri Esperanto por distanca edukado. Alex Phelps, esperantisto, helpis verki la kurson. Ĝi estis malnovstila kurso, bazita je gramatiko, praktikado de frazoj, kaj tiel plu.

Ĉiumonate studentoj devis sendi la lecionojn, la foliojn por ekzercoj, kaj ili estis korektitaj de s-ro Phelps. Tamen ĝi estis reklamita nur en la broŝuro de la Departamento pri Edukado, kiel unu elektebla kurso, tamen sen poentoj por diplomiĝo. Ĝi daŭris dek jarojn, kaj proksimume 200 homoj studis ĝin. Sed eble nur triono finis ĝin. Tio ne estas malbona.

Do KEA tiam estis sufiĉe vigla, sed dum la lastaj 45 jaroj bedaŭrinde Esperanto en Kanado — kaj en la tuta mondo — ŝrumpis. Laŭ vi, kial?

Mi supozas, ke la ĉefa kialo estas la granda disvastiĝo de la angla lingvo kiel ĉefa — kaj ĉiam pli evidenta — kandidato por la rolo de mondlingvo, almenaŭ en la mensoj de anglalingvanoj. Pro tio fariĝis multe pli malfacile, almenaŭ en anglalingvaj landoj, kvankam ne nepre tiel malfacile en aliaj landoj.

La plej grava evento, kiun vi organizis, estis la Universala Kongreso en 1984. Ni multe pritraktis ĝin en speciala numero de *Lumo* antaŭ du jaroj, okaze de la 40-jara jubileo. Sed ĉu vi povus mallonge diri, kiu estis via plej bona sperto kaj plej malbona sperto dum tiu UK?

La plej bona sperto estis kunlabori kun la aliaj membroj de la Loka Kongresa Komitato. Ili estis tre bonkoraj homoj. Ankaŭ la ĝenerala etoso estis tre bona. La antaŭ- kaj postkongresaj ekskursoj funkciis bone, kaj la loĝado ĉe la universitato UBC funkciis tute kontentige.

Bedaŭrinde, unu el la problemoj estis, ke la transportsistemo strikis du tagojn antaŭ la komenco de la kongreso. Tio estis serioza problemo. La distanco inter la universitato kaj la urbocentro estis sufiĉe granda, do oni devis uzi taksiojn, kaj tio ne estis tre oportuna.



Kanada Landkongreso, Viktorio B.K., 1972

Ni ankaŭ havis oficialan akcepton fare de la urbestro en la urbodomo, sed ĝi estis iom trafita de la striko, kaj kelkaj homoj ne povis alveni. Eĉ la urbestro mem malfruis, dirante ke li estis kaptita en trafiko.

En kiom da universalaj kongresoj vi partoprenis?
Mi pensas, ke en kvin.

El tiuj kvin, kiu estis la plej memorinda por vi?
Ho, jes — la Universala Kongreso en Helsinko. Tio estis aparte memorinda, ĉar poste mi iris al Eŭropo kaj vizitis kelkajn amikinojn, esperantistinojn, kaj tio finfine kondukis al mia edziĝo.

Do bona okazo por paroli pri vi kaj via familio. Rakontu pri via fono — kie vi naskiĝis, kiuj estis viaj gepatroj, kaj simile.
Mia patro naskiĝis en Papeete, Tahitio, en Franca Polinezio. Li estis franclingvano, sed ankaŭ parolis la anglan. Li studis en privata lernejo en Nov-Zelando, ĉar ne estis bonaj lernejoj en Tahitio. Poste li venis al Vankuvero. Mia patrino, aliflanke, enmigris el Anglio — tiel ili renkontiĝis.

Ĉu via patro iam parolis kun vi en la franca? Do ĉu vi ankaŭ lernis la francan?
Ne, mi ne parolas la francan. Li kelkfoje uzis ĝin, sed la hejma lingvo fariĝis la angla pro mia patrino.

Kiel vi malkovris Esperanton?
Tio okazis tre frue, kiam mi ankoraŭ ne bone kapablis lerni legi — eble pro atentomalordo aŭ disleksio. Mi estis forigita el la lernejo. Kaj mia privata instruistino, Mrs Wardle, (pasinta membro de la Londona Klubo de Esperanto ne instruis al mi Esperanton, sed ŝi diris al mi, ke mia nekapablo prononci aŭ literumi vortojn en la angla ne estis mia problemo, sed problemo de la angla lingvo. Ŝi donis al mi kelkajn Esperantajn vortojn por prononci kaj legi, kaj tiel plu. Mi vere ŝuldas al ŝi kaj al miaj gepatroj, ĉar ili donis al mi tiun ŝancon. Sen tio, mia progreso en la mondo de kulturo estus haltinta jam frue en mia vivo.

Kiam vi formale eklernis Esperanton?
En la 12-a klaso en la lernejo — tio estis en 1959 — mi aĉetis lernolibron (Teach Yourself Esperanto), kaj mi studis ĝin memstare, pro mia propra deziro. Sed ne estis grupo, kiun mi povis viziti. Do nur pli poste, kiam mi iris al Otavo kaj renkontis Boglari, mi serioze ekstudis. Mi rapide lernis, kaj poste iris al Eŭropo. Tio estis en '67, '68. En '69, mi jam iris al la Universala Kongreso.

Kaj tie vi renkontis vian edzinon Olga pere de Esperanto. Ĉu vi povus rakonti kiel vi renkontiĝis?
Estis tute amuza afero. Mi reklamis, ke juna kanada viro venos al Eŭropo kaj serĉas edzinon. Mi sendis leterojn al multaj, kaj entute mi havis 15 virinojn por renkonti en tiu somero. Mi ne renkontis ĉiujn, sed eble sep mi renkontis. Jes, estis tre interesa somero. La stulta afero estas, ke mi donis la saman informon pri mia alteriĝo en Prago al mia nuntempa edzino Olga, kaj ankaŭ al du aliaj, Anna kaj Silvia. Kiam mi alvenis en la atendejon de la flughaveno, mi vidis tri afiŝojn "Wally", "Wally", "Wally", kaj tiuj tri afiŝoj komencis konverĝi al mi. Tio estis sufiĉe embarasa afero. Estis du virinoj kaj unu viro. La viro estis la frato de mia nuntempa edzino Olga. Li multe ridetis kaj komprenis, kaj mi petis lin ne mencii al Olga pri la aliaj virinoj.

Mi esperas, ke Olga nun scias tiun sekreton kaj ne malkovros ĝin en *Lumo*... Ĉu vi baldaŭ geedziĝis poste?
Jes, ŝi ricevis permeson iri al konferenco en Londono pri kartologio. La plano estis, ke ŝi iru tien, kaj poste ŝi foriru el Londono kaj venu al Kanado. Mi sendis la bileton al la Kanada ambasadejo en Londono. Do tion ŝi faris. Sed ĉar tio estis neleĝa vojo, la registaro en komunista Ĉeĥoslovakio volis puni ŝin poste. Post jaro kaj duono, pro tiuj minacoj, ni devis reveni al Ĉeĥoslovakio por provi ĝustigi kaj oficialigi la permeson, por ke ŝi povu reveni en Kanadon. Finfine ni sukcesis eliri la landon kune, ĉefe pro la reputacio de ŝia patro, kiu estis estro de partizana grupo, kiu batalis kontraŭ la germanoj dum la milito. Por mi tio estis iom streĉa tempo, kaj mi ne komprenis la ĉeĥan. Mi iris kun Olga al tiuj intervjuoj, kaj sidis sur ligna benko proksime, kaj aŭdis la laŭtajn voĉojn en la ĉeĥa, kiuj severe kritikis Olga-n pro tio, kion ŝi faris.



Geedziĝo (1972)

Ĉu post ŝia alveno en Kanadon ŝi tuj alkutimiĝis al la lando? Mi supozas, ke ŝi ne parolis la anglan je la komenco?
Ne, ŝi ne parolis. Ŝi parolis nur la ĉeĥan kaj la rusan — la rusa estis deviga fako en tiu tempo. Ĉar mi estis manaĝero de la Ardmore-golfejo, kie ni havis teejon, kafeterion, mi proponis al ŝi, ke mi instruu al ŝi kelkajn frazojn, kiujn ŝi bezonus por servi sandviĉojn kaj teon, ktp., ĉe la tabloj. Ŝi rapide lernis la anglan — sed ŝi faris kelkajn erarojn kaj foje alportis malĝustajn aferojn al klientoj — sed tamen tio helpis, mi pensas. Poste ŝi ankaŭ sekvis kurson, kaj mi mem instruis ŝin.



Kanada-Usona Komuna Kongreso, Sideno B.K., 2004

Ĉu Esperanto tiam estis via familia lingvo, kaj ĉu ĝi restas tia ĝis nun?
Jes, jes. Olga ofte diris, ke Esperanto por ŝi estas ripoziga lingvo, kan ankaŭ por mi estas tiel — ni povis paroli Esperanton post longa tago de parolado en la angla. Mia filino Hana estas trilingva: la angla, la franca kaj Esperanto; kaj mia filo Evan parolas la anglan kaj Esperanton.

Ĉu ili ankoraŭ parolas Esperanton kun vi kaj Olga?
Kun Hana — jes. Ŝi parolas kun ni Esperante. Mia filo — malofte. Li komprenas, se oni parolas al li, sed li mem ne ofte uzas ĝin. Nu, tio venas kaj iras laŭ la tempo.

Krom Esperanto, vi faris multajn aferojn en la vivo. Vi multe agadis kun indiĝenoj en Kanado. Kiam vi ekinteresiĝis pri indiĝenoj, kaj kion vi faris por helpi ilin?
Mi ekkonis kelkajn junajn amikojn, kiuj estis indiĝenoj el la rezervejo en mia regiono. Poste, kiam mi iris studi ĉe UBC, mi partoprenis en aktivadoj, kaj ĉe rezervejo mi instruis legadon — ne la lingvon mem, sed legkapablojn.
Poste mi iris norden por fariĝi socia laboristo laŭ la Alaska-ŝoseo, inter Charlie Lake kaj la teritorio de Jukono. Tie mi laboris plentempe kiel la sola socia laboristo por regiono kun centoj da mejloj da malglataj vojoj. Tio estis en la 1960-aj jaroj — la tiel nomataj "teruraj sesdekaj jaroj", kiam oni forprenis infanojn de indiĝenaj familioj.
Mi estis atestanto de tri maljustaj forprenoj de infanoj, kiuj estis senditaj al blankaj familioj en la sudo. Mi protestis, raportis kaj argumentis kontraŭ tio. Fine, kiam nenio ŝanĝiĝis kaj miaj raportoj estis ignoritaj, mi kaj alia socia laboristo decidis iri al la publiko, sen mencii nomojn, por paroli ĝenerale pri la problemoj.
Rezulte aperis grandaj artikoloj en la ĵurnaloj de Vankuvero, kaj mi estis maldungita, same kiel kvar aliaj sociaj laboristoj. Oni diris al ili, ke ili povus reveni nur se ili promesus ne plu subteni publikajn raportojn.

Ĉu laŭ vi viaj protestoj havis efikon?
Eble jes. La forpreno de infanoj ĉesis ne longe poste, aŭ almenaŭ malpliiĝis. Ankaŭ oni malfermis oficejon de socia bonfarto en Fort Nelson, kio antaŭe ne ekzistis.

Ĉu vi daŭre laboris por indiĝenaj komunumoj poste?
Jes, multe pli poste. Kiam mi jam estis en Sidney kaj laboris ĉe la golfejo, oni bezonis instruiston por la rezervejo Shehalis, apud la rivero Harrison. Mi helpis plurajn lernantojn fini sian mezlernejan diplomon.
La komunumo tiam reekmalkovris sian kulturon. Multaj homoj volis revivigi tradiciojn. Mi helpis konstrui tradician subteran domon (pithouse), kvankam mi mem ne sciis kiel fari tion! Mi kontaktis la Muzeon de Antropologio ĉe UBC, kaj specialisto venis por helpi. Tio estis por mi tre valora sperto.

Dum via vivo vi ankaŭ laboris kiel instruisto, ĉu ne?
Jes, mi instruis literaturon kaj teatron. Mi tre ŝatis tion — la laboro estis bona, kaj la studentoj ĝuis la programojn.

Ĉu vi ankaŭ mem aktoris aŭ produktis teatraĵojn?
Jes, sed ne tre grandskale.

Ĉu vi iam faris teatraĵojn en Esperanto?
Jes, dum eventoj Olga kaj mi faris kelkajn skeĉojn, sed ne grandajn prezentojn.

Vi ankaŭ verkas poemojn. Kial vi komencis?
Mi unue verkis en la angla, poste en Esperanto. Miaj poemoj troveblas ĉe verkoj.org kaj en diversaj gazetoj. Esperanto estas, laŭ mi, tre bona lingvo por poezio.

Ĉu vi ŝatas Esperantan literaturon?
Jes, mi havas sufiĉe grandan bibliotekon. Mi ŝatas ekzemple Grabowski kaj William Auld.

Lasta demando: vi ĵus festis vian 86-an naskiĝtagon. Kia estas via sano?
Ne tre bona. Eble ĉi tio estas mia lasta intervjuo.

Ĉu vi sentas, ke restas al vi io por fari en la vivo?
Jes. Oni devas lukti ĝis la lasta momento por amo, kunlaboro kaj la plua evoluo de la homaro.

Ĉu vi estas optimisma?
Jes, laŭ kosma vidpunkto. La vivo sur la Tero estas miraklo — kaj probable ne unika. Eble aliaj mondoj ankaŭ evoluis. Kaj eĉ se nia eksperimento malsukcesus, la vivo daŭrus aliloke.



La Kreado de Testud-insulo

De Luis **Obando**
Brita Kolumbio

Ĉi tiu legendo apartenas al gentoj Aniŝinabaj kaj Irokezaj (Haudenosaunee), kiuj historie loĝis ĉirkaŭ la Grandaj Lagoj de Kanado (en Ontario kaj Kebekio).

Longe antaŭ ol la kartografoj siajn unuajn liniojn desegnis, la mondo estis ununura, vastega etendo da akvo. Ekzistis neniuj bordoj, nur la spegulbildo de la ĉielo sur la profundo. Tiam venis interrompo: Ĉielvirino, falanta de la disŝirita ŝtofo de la firmamento.

Ŝi krake ne frapis la akvon, ŝin kaptis la bonvolemaj flugiloj de anseroj, kiuj milde mallevis ŝin ĝis ŝi ŝvebis super la ondoj. Tamen, ŝi ne povis flosi eterne. Ŝi bezonis hejmon. Ŝi bezonis teron.

La bestoj de la profundo kunvenis en konsilio de senespera neceso. La Granda Testudo proponis sian dorson kiel fundamenton, sed mankis al ili la grundo por konstrui sur ĝi. La plej fortaj inter ili volontulis por preni ĝin de la oceana fundo. La Gavio, kun sia fantoma krio, plonĝis profunde sed revenis anhelante. La Kastoro, forta kaj firma, naĝis ĝis liaj pulmoj flamis, alvenante kun neniu signifa sukceso. La profundoj estis tro malhelaj, la premo tro granda eĉ por la plej potencaj.

Tiam, la silenton rompis delikata voĉo. Estis la Ondatro, la plej humila el la naĝantoj. Sen fanfaro, li sin ĵetis en la abismon.

La tempo etendiĝis, la akvoj restis kvietaj. Kiam lia korpeto finfine drivis al la surfaco, la bestoj preskaŭ funebris, timante ke ĉio estas perdita. Sed la Ondatro ne malsukcesis. Forte tenata en lia eta piedo estis premio, kiu valoris pli ol la vivo mem: iomete da malseka tero.

Respektoplene, Ĉielvirino tiun oferon prenis kaj ĝin metis sur la ŝelon de la Testudo. Ŝi prie ekdancis, lante, laŭ ritma paŝado de dankemo. Dum ŝiaj piedoj moviĝis, la tero rave ekspansiis. La tero fariĝis insulo, la insulo fariĝis kontinento. Valoj mem sin skulptis, kaj montoj mem sin levis por la ĉielon renkonti.

Ni nomas ĉi tiun kontinenton Ameriko, sed en la memoro de la akvoj kaj la ventoj, ĝi restas Testud-insulo, atesto pri la vero, ke eĉ la plej malgrandaj inter ni kapablas surporti la tutan pezon de la mondo.



Renkontu Alekson Miller, la ricevinto de la Premio Maertens 2026!

Intervjuita de Ĵenja Amis

Saluton, Alekso! Dankon pro via akcepto intervjuiĝi en *Lumo* kaj gratulegojn pro la premio Maertens! Tiom meritite!

Dankon, Ĵenja. Tiu premio estis tre bonvena novaĵo post aparte longa jaro de laboro por la movado. Akiri financan subtenon por Esperanto-projektoj estas tiel malfacile kaj komplike, ke ni ofte devas labori senpage aŭ plu labori post la antaŭplanita pagado. Tial premio ĉi tia kun stipendo multe deturnas aktivulon for de la tento simple kabei pro elĉerpiĝo. Mi aprezas la subtenon de vi kaj Brandon Sowers, kiu ĵus menciis al mi, ke vi du nomumis min por tiu honoro. Tre kortuŝe.

Rakontu pri vi iomete! Ĉu vi ĉiam revis fari filmojn? Rakontu pri via unua filmo! Kiom aĝa vi estis, kiam vi faris ĝin?

Krei plenajn filmojn fakte estas nur ĉi-jardeka afero por mi. Mi delonge aktoras kaj de tempo al tempo mi prunte uzis profesian kameraon por krei kurtfilmon sed mi pli ofte simple amikiĝis al reĝisoroj, kiuj metis min en siajn projektojn aŭ mi dungiĝis per kutima provprezento kiam filmo kreiĝis en mia ŝtato. Post mia translokiĝo al Atlanto en Georgio, mia nova samdomano Isaac Deitz (Isaak) estis ĉefe filmisto anstataŭ aktoro. Mi lernis de li kiel reĝisori kaj munti filmojn por ne plu devi atendi la kapricon de aliuloj por krei ion. Lia ĉiusemajna filmfarada evento KTL ("Kick The Ladder") (www.kicktheladder.com) kuraĝigis min kaj aliajn aktorojn fariĝi la estroj de niaj projektoj anstataŭ nur subuloj. Ankaŭ mia frato Adam estas tre lerta filmisto do ni hejme kreis aferojn kune junaĝe. Neniu specifa frua film-sperto aparte influis min; nur gravis, ke ni daŭre kreis filmojn kaj kreskis en niaj lertoj, kaj mi volas, ke tia kreskiga etoso ekzistu en Esperantujo.

Kiam kaj kiel vi esperantistiĝis?

Mi hazarde trovis vikipedian artikolon pri Esperanto dum aprilo 2013 kaj decidis provi lerni la plej facilan lingvon en la mondo kiel personan aktoran defion. Mi elŝutis sufiĉe malnovan kaj senkopirajtan lernolibron de Ivy Kellerman Reed kaj instruis min tiel. Post tri jaroj mi ĉeestis NASK-on 2016 en Norda Karolino (kiu estis nur tri horojn for aŭte de mia tiama hejmo en Virginio) kaj finfine renkontis homojn, kiuj parolas la lingvon.

Kiom da filmoj vi jam faris entute? Kiom da ili en Esperanto?

Dependas de la terminoj. Ĉu mi kreis kiel la reĝisoro aŭ multe partoprenis kiel eble aktoro, muntisto, aŭ kameraisto? Ni diru "multe partoprenis." Kaj kio estas filmo? En presita literaturo, ni havas librojn, gazetojn, scenarojn,

bultenojn, kaj broŝurojn. Ĉu la demando estu kiom da libroj verkis aŭtoron aŭ simple kiom li verkis? Mi ofte video-blogas pri mia vivo aŭ prezentas gramatikajn lecionojn aŭ registras plenajn prelegojn kaj koncertojn. Ni nomu tiujn aferojn videaĵoj kaj ne kalkulu ilin. Filmo devus enhavi verkitan intrigon kaj artajn planojn (en la fotila senso) kaj poste, ĝi devus havi vivan spektantaron. Nur tiel, reĝisoroj ekscios, ĉu la filmo efikas. Kiam David Beck flugis al Atlanto por prezenti sian Esperanto-filmon "La Hundido," li diris al mi poste, ke li tuj konsciis, rimarkante la reagojn en la ĉambro, ke lia filmo nepre devus esti malpli longa kaj li sciis, kie li devus tondi ĝin. Do pri tiaj filmoj miaj, kie ankaŭ mi spertis spektantaron, estas almenaŭ cent, ĉefe dank' al la KTL-programo de Isaac Deitz.

Rakontu pri via Jutuba Kanalo, Exploring Esperanto!

La kanalo simple estis mia persona aktora kanalo dum kelkaj jaroj. La mirinda semajno, kiun mi ĝuis ĉe NASK 2016, instigis min krei videaĵojn kun ekzemplaj poemoj kaj kantoj en Esperanto, por ke homoj povu pli facile kaj rapide lerni pri la lingvo kun klarigoj en la angla. Komprenante la lingvon pli kaj pli, mi aldonis gramatikajn lecionojn por ke aliuloj lernu la lingvon pli facile.

Esperanto-USA donacis al mi stipendion por novaj kamerao kaj mikrofono en julio 2019. Mi planis serion de dulingvaj filmoj en la angla kaj Esperanto kie miaj ne-Esperantistaj amikoj aperas. Mi komencis la serion kun la filmo "Al Virino," kie la vira aktoro legas elektronikan libron en la rakonto sed li vere legis la skripton tiel por ne devi parkerigi fremdaĵojn. Mi ofte uzis tiajn trukojn por kaŝi la fakton, ke nur mi el la skipanoj vere parolas Esperanton. Ekzemple, en "Kara Onklo," mi instruis al la knabino simple diri "jes" rimarkante mian kapjeson kaj diri "onklo" kiam ajn mi tuŝas ŝian brakon parolante. Ĉio alia, kiun ŝi "diras" al mi, estis skribita sur ŝiaj notoj, kiujn ŝi amuze daŭre donas al mi tra la filmo.

Mi kreis Patreon-paĝon (www.patreon.com/ExploringEsperanto) en 2020 por pagi la aktorojn kaj kameraistojn en tiuj filmoj. Ĝi ankaŭ helpis min aĉeti novajn filmilojn kaj labori ĉiumonate pretigante miajn lecionojn. La kvanto de financa subteno ŝanĝiĝas de monato al monato sed tiuj homoj (inkluzive de vi, Ĵenja, kaj multaj aliuloj legantaj ĉi tiun intervjuon) ebligis al mi fari la imponajn projektojn, kiuj nun venigas al mi premion, do mi dankas vin.

Rakontu pri viaj roloj en ne-Esperantaj filmoj kaj via aktora vivo kaj kariero! Rakontu ankaŭ pri la serio pri George Washington – kiu estis via rolo en ĝi? Kie eblas ĝin spekti?

Jes, mia unua parolanta rolo en televidserio estis "Turno: Spionoj de Vaŝingtono" ("Turn: Washington's Spies") por AMC, kie mi ludis la adjutanton de Generalo Vaŝingtono. Mi aperis en kelkaj epizodoj. Post tio, mi ludis soldaton en la hospital-dramo "Kompat-strato" ("Mercy Street"), nazion en la filmo "Imperio" ("Imperium") kaj gimnazian brutalon en la kristana komedio "Altaraj Egooj ("Altar Egos"). En la serio "Hejmlando" ("Homeland") por HBO, mi ludis hotelan grumon en epizodo sed plejparte dublis la aktoron Mandy Patinkin. Mi faris tion ankaŭ en Atlanto por la hospital-dramo "La Rezidanto" ("The Resident"). Dubli en Esperanto ne simple temas pri la aldono de fremdaj lingvoj aŭ danĝeraj akrobataĵoj; mi estis lumo-dublanto kiu ripetas la moviĝojn de la filmota aktoro dum la komplikita aranĝado de la kameraoj kaj lumoj. Kiam la vera sceno filmiĝas, mi ĝuas libertempon kaj dum tiuj longaj tagoj mi ekverkis miajn dulingvajn infanlibrojn pri la pirato Kapitano Katarino. Pri tio, kiel spekti tiujn aferojn, tio ŝanĝiĝas de monato al monato kaj dependas de elsendaj rajtoj en ĉiu lando, do vi simple devos individue kontroli.

Vi estas konata en Esperantujo kiel fondinto kaj longdaŭra prizorganto de la Usona Bona Film-Festivalo. Rakontu pri ĝi iomete. Kio instigis vin fondi ĝin? Kiam kaj kial vi decidis transdoni la administradon al aliaj?

En 2019 mi partoprenis en la filmkonkurso "Mia Asocio, Mia Urbo" kaj gajnis la duan premion. Neniu alia de mia lando partoprenis kaj UEA eĉ aldonis pliajn premiojn meze de la konkurso por instigi pli da homoj al partopreno. La ĉefaj problemoj laŭ mi estis tro da reguloj kaj maltro da premioj. Miaj amikoj diris, "Mi nepre ne gajnos do mi ne provos sed eble vi povos, Alekso." Aliaj plendis pri





la longega listo de postulataj aferoj. En la filmo devas aperi vidindaĵoj de via urbo kaj loka kluba renkontiĝo kaj informo pri la historio de la urbo, kaj tiel plu. Kaj oni devas skribi kaj aldoni subteksto post la filmado kaj muntado. Mi menciis la fortimigajn postulojn al la organizantoj kaj ili respondis, ke tiuj simple estis ĝeneralaj rekomendoj kaj oni ne devas enhavi ĉiun menciitan aferon. Sed la gramatiko ne indikis tion kaj la fortimigo jam okazis. Mi scivolis, kiel sukcesa estus konkurso en kiu eĉ amatoroj havas ŝancon gajni kaj ne estas tiom da postulitaj aferoj por fari.

Mi uzis la KTL-programon kiel ŝablonon. Isaac permesas filmojn ĝis nur unu minuton longaj, argumentante, ke se oni ne povas koncize rakonti kaj interesi la spektanton ene de minuto, oni ne meritas 10 minutojn de ties vivo por pli longe tedi lin. Mi decidis, ke 5-minuta maksimumo sufiĉos (tamen, mi konsilas, ke venontjare ĝi fariĝu 3-minuta por plibonigi la kvaliton kaj ŝpari tempon al la festivalestro kaj ĵurianoj). Mi aldonis postulatan rekviziton por garantii, ke la filmoj estu freŝe kreita por la konkurso kaj por ekinspiri la verkadon de la skripto. Se kulero devas aperi, vi tuj imagos situaciojn en kuirejo aŭ restoracio anstataŭ fiksrigardi malplenan paĝon sen iaj ajn ideoj.

Estrinte la konkurson kvin fojojn dum tri jaroj, mi sciis, ke la programo ne longe sukcesos, se ĝi tute dependos de miaj laboro kaj pasio. Mi mem tajpis la subtitolojn en du lingvoj por preskaŭ ĉiu filmo por ne fortimigi amatorojn, kiuj ne scipovas aŭ simple ne volas fari tion. Tia komplezo ne eblas je pli kaj pli granda skalo. Mi ankaŭ ne povis aperi en la filmoj se mi restis la estro, kaj multaj reĝisoroj en Atlanto povus krei bonegajn filmojn kun almenaŭ unu aktoro, kiu bone parolas la lingvon. Mi do petis al Catie Neilson preni la bridojn ĉar ŝi jam servis kiel reĝisoro kaj ĵuriano en la konkurso. Ŝi konsentis fari ĝin du fojojn kaj Aaron Fingtam verŝajne estros ĝin en 2026. Multaj homoj diras, ke la festivalo devus okazi kaj ili eĉ finance subtenas ĝin, sed mankas homoj, kiuj volas estri aŭ prizorgi ĝin. Kontaktu min aŭ la organizon Esperanto-USA se vi volas helpi pri la projekto.

Mi volas aldoni, ke la nomo Usona Bona Film-Festivalo gravas al mi. Mi foje aŭdas de homoj, ke “Usono” ne devus esti en la nomo se la konkurso estas tutmonda. Mi malkonsentas. Usono havas malbonan reputacion en multaj landoj kaj meritas tion. Mi estas usonano kaj mi volas haltigi la hontindajn agadojn de mia registaro. Virino el mia naskiĝa ŝtato Minesoto ĵus murdiĝis pro tia kontraŭstaro. Mia koro rompiĝis kaj mi fakte ploras tajpante ĉi tiun alineon. Mi volas esti fiera pri io kreita en mia lando, io, kio helpas artistojn tra la mondo. Mi esperas, ke vi pensos pri kompataj, inteligentaj kaj respektemaj homoj, kiam vi legas la vorton “usona” en Esperanto ĉar almenaŭ la Esperantistoj en mia lando nepre meritas tiun priskribon.

Ĉu vi estas feliĉa pri kie ĝi estas nun, jam je ĝia sepa eldono? Ĉu vi fakte sukcesis distanciĝi de ĝi aŭ ĉu vi daŭre helpas pri tio kaj jeno?

Fakte nur ĉi-jare mi finfine kontentas pri la festivalo. Mi volis produkti almenaŭ 200 filmojn kaj tion ni finfine atingis. Mi ankaŭ celis pli altan kvaliton inter la premiitoj kaj ankaŭ tiel ni sukcesis. De la komenciĝo ĝis nun, mi simple devis plu labori kaj iel ajn instigi homojn al partopreno. Sed nun, post sukcesa atingo de tiuj defiaj celoj, se Aaron fariĝos tro okupata prizorgante sian novan bebon ĉi-jare kaj la festivalo ne okazos, ĝi ne okazos. Mi mem ne savos ĝin ĉar mi devis multe malrapidigi mian aktoran karieron por prizorgi la festivalon kaj mi ne plu volas fari tion.

Estas bona novaĵo, ke ĉi-jare la kvanto de konkursaĵoj duobliĝis. Malbonŝance, mi subite devis helpi al Catie aranĝi ilin kaj respondi al la reĝisoroj, ĉar ŝi nur havis monaton por ĉion aranĝi antaŭ la promesita publikigo. Neniu alia film-festivalo en la mondo (laŭ mia scio) havas respondecon

prizorgi la lingvon de la filmoj. Se filmo uzas strangan dialekton aŭ akĉenton en angla filmfestivalo, ĝi simple estas unika kaj ĉarma trajto de la filmo. En Esperanto-filmo, tio riskas misinstrui la spektantaron pri la gramatiko. Ni do sendis mesaĝojn al la reĝisoroj petante re-tajpitajn titolkartojn sen skribitaj eraroj kaj eĉ novajn sonbendojn sen prononcaj eraroj. Ju pli longaj la filmoj, des pli multe la eraroj. Ju pli multe la film-kvanto, des pli multe la korektindaj eraroj. Eĉ post tiaj penoj, vi rimarkos neperfektajn aferojn en la filmoj, do imagu kiaj ili estus sen tia helpo. Do ne, mi ankoraŭ ne sufiĉe distanciĝis, sed mi esperas, ke malpli longaj filmoj kaj pli da tempo inter la ensenda limdato kaj la publikigo de la filmoj ebligos aliulojn fari tiujn taskojn sen mia malantaŭ-kulisa helpo.

Ĉu esti vic-prezidanto de Esperanto-USA helpis, aŭ male forprenis vian tempon de viaj artaj projektoj en Esperanto?

Tio forprenis tempon de mia arto, bedaŭrinde. Ĝi informis min pri tio, ke ekzistas fondusoj por projektoj en nia organizo, sed tiuj homoj, kiuj plej efike uzus monon por la movado ne rajtas, kompreneble, disdoni fondusan monon al si mem. Ironie, niaj plej aktivaj samideanoj ne devus resti estraranoj longtempe, ĉar la organizo ne rajtos multe helpi ilin. Estas bone, ke mi ne aperis en filmoj dum la unuaj kvar festivaloj, sed mia posta aktorado kreis multajn premiitajn filmojn.

Malgraŭ tio, estis ja bone deĵori en la estraro tri jarojn (2020–2023). Mi tion faris por danki la organizon por la novaj film-ekipaĵoj en 2019. Bonŝance, miaj laboroj kiel vicprezidanto kaptis la atenton de Brandon Sowers (kaj laŭ li, reaktivigis lin en la movado) kaj li nun servas kiel la prezidanto de la organizo kaj jam multe plibonigis ĝin. Sen lia helpo, la festivalo verŝajne ne daŭre ekzistus.

Estas dank' al vi, Alekso, ke ni havas filmon de la teatraĵo "1910", kiun ni muntis por la Montreala UK. Dankegon pro la filmado kaj muntado de la filmo mem kaj de ĉiuj aldonaj materialoj por la bluray-disko. Ĉu vi povas diri kelkajn vortojn pri la diska projekto – kio estos en ĝi, kial vi decidis fari ĝin kaj kie ĝi estos aĉetebla?

Jes: ĝi enhavos pli ol du horojn da suplementoj, inkluzive de retrospektivo kun ĉefaktoro Garry Evans, post-spektadaj demandoj de la spektantaro, plena podkast-epizodo kun la skipanoj (kiun mi multe poluris por forigi paŭzojn kaj balbutojn), intervjuoj kun vi, Ĵenja, pri la verkado kaj muntado de la afero, kaj intervuo kun mi pri la filmaj defioj, kiujn ni spertis registrante ĉion. Mi eĉ aldonis ekskluzivan Ŝekspiran kurtfilmon, kiu nur spekteblos sur tiu disko.

Krei diskon en Esperanto kun profesiaj menuoj kaj subtitoloj en 8 lingvoj estas aparte komplika afero kaj la ekzistantaj aŭtor-programoj ne jam havas tiujn agordojn, do ni bezonos la helpon de iu diskopresanta fabriko por finfari la eldonon. Bibliotekoj kaj arkivoj atentos fizikan eldonon de teatraĵo multe pli ol hazarda kolekto de Jutubaj videaĵoj, do tial mi ne simple afiŝas tiujn aferojn sur Jutubo. Unikaj ekskluzivaj aferoj ne jam troveblaj en Jutubo helpos nin vendi la diskojn kaj iomete re-enspezi post la grandaj investoj, kiujn jam faris Esperanto-USA kaj la Kanada Esperanto-Asocio. La teatraĵo mem estas senpage spektebla en mia kanalo, do spektu ĝin kaj poste vi nepre ĝuos la novajn surdiskajn aferojn.

Kiuj estas viaj sekvaj filmaj kaj artaj projektoj?

Nu, la film-industrio iom lantas nuntempe en Atlanto, sed mi volas re-aranĝi kaj ĝisdatigi miajn retpaĝojn kiel aktoro, por ke mi pli facile dungiĝu en projektoj. Mi aktoris en vertikala longfilmo pasintjare nomita "Mi Havas 5 Mojosajn Fratojn" ("I Have 5 Kickass Brothers"). Tiaj malmultekostaj kaj amuze stultaj filmoj furoras lastatempe kaj mia amikino Audrey (Aŭdreo), la edzino de Isaac, multe reĝisoras tiujn, do espereble mi laboros pli ofte tiel.

Mi volas krei plenlongan filmon en Esperanto. Laŭ multaj homoj, nur tiaj aferoj kalkulindas en la kino. La pli ol 220 kurtfilmoj de la festivalo estas 12 horojn longaj, sed individua 2-hora filmo estas tute alia afero. Eble animacia afero estus pli farebla ĉar tio forigus la bezonon parkerigi la tekston kaj perfekte prononci ĝin dum komplikita filmado. Mi rimarkas kelkajn lertajn animaciistojn kiuj konkursis en la festivalo, do eble ili volos kunlabori. Se vi volas paroli kun aliaj filmistoj pri Esperanto, aliĝu al la filmfestivala babilejo en Telegramo (t.me/usonabona). Mi dankas al vi denove pro la ŝanco libere babili pri miaj aferoj. Kiam mia lando denove fariĝos sekura por vizitantoj, mi kuraĝigos la Esperantistojn kontakti min kaj tranokti en Atlanto per Pasporta Servo.



Ankaŭ vidu intervjuon kun Alekso

Recenzo

Naskitaj sur la ruino de Miyamoto Masao

De Martin Morris
Kebekio



Martin Morris estas la bibliotekisto de KEA kaj ESK. Membroj de ambaŭ asocioj rajtas prunt-epreni iun ajn libron (inkluzive de tiu re-cenzita ĉi-sube) el la biblioteko senpage. Vi devas pagi nur la resendo-kostojn (la sendokostojn pagos la biblioteko).

Imagu: la jaro estas 1945, sur la malgranda pacifika insulo Aka. La Dua Mondmilito proksimiĝas al sia fino. Japanaj soldatoj mortas milope. Inter tiuj soldatoj troviĝas unu viro kiu, anstataŭ batali ĝis sia lasta san-goguto faras strangan, eĉ danĝeran, decidon. Li volas esti kaptita. Jen la komenco de Naskitaj sur la ruino, originale verkita Esperanta romano de la japana Es-perantisto Miyamoto Masao (宮本正男).

Naskitaj sur la ruino konsumis pli ol 15 jarojn de la vivo de Masao, de la publikigo de la unua ĉapitro en Monda Kulturo jam en 1962, de la fina publikigo de la kompleta teksto en 1976 de Librejo Pirato. Tiu longa gestada periodo lasas multajn spurojn tra la romano, kiu estas plena je penaj memoroj. En la postparolo la aŭtoro estas kortuŝe honesta pri tiu ŝarĝo. Eĉ kiam li finis verki la novelon, li skribas:

"...mia koro ne estas liberigita."

La neheroa ĉefrolulo

La verko sekvas Hamada Ikuo — iaman kontraŭleĝe agantan laboristan aktivulon kaj komunistan simpa-tianton — kiu tute konscie dezertis el la 32-a Korpuso kune kun du kamaradoj en la kriza fino de la bataloj en junio 1945. Li estas kaptita de nigra usona soldato kun aŭtomata pafilo ĉe la suda marbordo, proksime de la rivero Minatogawa, kaj la resto de la romano kadriĝas en la usona koncentrejo.

Hamada ne estas heroo. Li scias, ke Japanio perdos la militon, kaj volas nur postvivi por vidi la sekvan tagon. Kiam la soldato aperas antaŭ li kaj krias "Hands up!" ("Levu la manojn!"), Hamada sentas preskaŭ... trankviliĝon. Li atendis sian kaptitecon kun la profun-da konvinko, ke la japana militismo devas esti venkita por ke demokratio estu ebla. Tiu malkutima starpunk-to donas al la tuta rakonto akran ironian dimension: la "malamikoj" estas la savantoj; la "samsortanoj" estas ofte pli danĝeraj ol la usonanoj.

Strukturo: antidramaturgio kiel intenco

La sep ĉapitroj malvolviĝas ne laŭ granda dramaturgio, sed laŭ la ritmo de ĉiutaga vivo en kaptiteco: enketoj, malsato, ludo, denuncoj, politika organizado, ribelo kaj puno. T i u antidramaturgia struk- turo estas intenco, ne malforto. La realo de la koncentrejo ne estas historia aventuro — ĝi estas premo, tedio, psikologia kolizio.

La vera malkovro: la hierarkio sekvis lin

Kiam Hamada eniras la koncentrejon, li estas preskaŭ kontenta — li kredis, ke la usonanoj reprezentas demokration kaj liberecon. Sed tiam li malkovras ion tre profundan: la japana hierarkio — sistemo kiun li tiom profunde abomenas — sekvis lin ĉien.
Suboficiroj sklavigas la simplulojn, kaj la regi-mentestroj manĝas plenstomake dum aliaj malsatas kaj soifas. La deviga respektado al rangoj — ĉio ĉi rekonstruiĝas interne de la pikdratoj, ĉar la usonanoj lasis la kaptitojn mem administri sin. Jen la centra kruela kerno de la romano, kaj Masao priskribas ĝin detale, kaj sen emocio.

La "Nokto de Pugnobatoj"

En ĉapitro tri, jam finiĝis la batalo sur la insuleto Aka. La soldatoj, iamaj subuloj turmentataj dum jaroj de siaj oficiroj, decidas ke la tempo de regado finiĝis. Ĉiun vesperon ili kondukas unu eksan superulon al la ĉefa vojo tra la koncentrejo (la Yaka-Ginza), kaj batadas ilin. La batado liveras kvazaŭ ceremonian justecon: ĉiu ricevas pugnobatojn laŭ ties antaŭa krueleco. La nomo donita al tiu evento? "Doni la finan punkton per negocado..."

Hamada mem levas sian pugnon nur unu fojon, kiam oficiro provas ŝirmi sin uzante la nomon de la imperi-estro (La "Tennoo"). En tiu momento, Hamada sentas ion eksterordinaran, ke li batu ne la homon, sed la tutan sistemon. "Li sentis infane, ke li efektive punis la

Tennoon." Ĉu tiu sceno estas kontraŭa al lia pacismo? Certe. La libro ne provas tion kaŝi.

Ribelo kaj puno: ambaŭ flankoj elmontritaj

Masao evitas simplismon. La usona armeo, prezentita unue kiel kvazaŭ liberiga forto, rapide elmontras sian propran kruelon. En la memorinda ĉapitro "Krimo kaj puno", ok "ribelaj" kaptitoj estas devigataj resti nudaj sur la kvar membroj, sen manĝaĵo kaj sen trinkaĵo, dum pli ol kvar tagoj kaj noktoj. Dume, gardisto pafas kuglojn en la teron ĉirkaŭ iliaj piedoj.

Tiun punon sekvis la ĝenerala ribelo organizita de Hamada kaj liaj kolegoj, kies slogano diris ĉion: "No hope, no work!" ("Nenia laboro sen espero!") — skribita sur kamionoj, tendoj ktp. La amaso de simplaj soldatoj, sen ajna ĝenerala signalo, eksplodis propramove, ne ĉar Hamada instigis, sed ĉar la indigno jam estis tro plena.

Masao priskribas la punon sen drama ekscesо, kaj tial ĝi trafas des pli forte. Hamada, eĉ preskaŭ svena post kvar tagoj nuda kaj senmova en la plena aero, fariĝas alia homo. Li ploras, ne pro honto, sed pro malespero antaŭ la vera karaktero de la homoj, kiun li ĝis tiam idealigis. Li ne unuigas la usonan imperialismon kaj la japanan militismon, sed li rifuzas ankaŭ idoligi la "liberiganton."

"Batalfrukto": la ekonomio de travivado

La libro estas ankaŭ riĉa je ironia humuro, tiu malgaja humuro kiun karakteras multaj, kiuj travivis la netraviveblan. La kaptitoj laboras ĉiutage en la usonaj staplejoj, kaj ĉiutage ili ŝtelas. Bieron. Cigaredojn. Viandon el Aŭstralio. Eĉ revolveron, kelkfoje. El cigaredoj naskiĝas tuta nigra merkato: pantalono kostas dudek skatolojn da Lucky Strike, botoj kvin skatolojn.

La vorto batalfrukto, inventita de la kaptitoj por nomi tiujn ŝtelitajn varojn, kaptas perfekte la spiriton de la koncentrejo: ĝi enkapsuligas la ekonomion de trompado kaj la dignon de travivado en unu sola vorto. Masao priskribas tiun merkateton kun humuro kaj amo. Ĝi estas la ununura loko en la tuta libro, kie oni la leganto sentos rajton rideti.

La radio — kaj la malkuraĝigo

Proksime al la fino venas sceno de alia speco. La koncentrejo havas radioricevilon, kaj Hamada ekploras aŭskultante la voĉon de Tokuda Kyūichi, la ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Japanio, kiu suferis 18 jarojn da malliberecо pro siaj ideoj.

Tamen, en la momento kiam liaj emocioj ekdegelas, io frida envenas en lian koron. Tokuda parolas pli kaj pli pasie pri la malsato de la laboristoj, sed al Hamada li ŝajnas ĉiam pli kaj pli malproksima. Hamada memoras ke tiu gvidanto iam petis ke oni sendu al li en la malliberejo kaj La Kapitalon kaj popularan vulgaran romanon, metante ilin do sur la saman nivelon. "Se tiu Tokuda povas esti la ĝenerala sekretario..." li pensas, sed ne finas la frazon.

Tiu silento diras pli ol ĉia argumento. Masao ne provas esprimi ke li kontraŭas maldekstrismajn ideojn, sed pli ke li mature, iomete malĝoje skeptikas pri la homoj, kiuj ilin tenas.

Lingvo kaj stilo

La esperanta prozo de Masao estas kompetenta kaj klara, sed ne aparte stilisma. Li utiligas la lingvon kiel precizan instrumenton por priskribo kaj introspekto, kaj lia voĉo estas la voĉo de homo kiu decidis finfine eldiri la veron post longa kaj dolora silento. Tia voĉo havas pezon, kiun stila brileco malfacile anstataŭus.

Fojfoje ekbrilas poetaj momentoj, precipe en la ferma sceno, kiam la boato forlasas la insulon sub la kanzono "Ĝis revid', vi Okinav.'"

La glosaro ĉe la libro estas utila kaj atentema. William Auld ĝuste nomis la libron romano, ne novelo: ĝi havas la pezon kaj kompleksecon de plena romano.

Historiaj kaj politikaj perspektivoj

Okinavo mem aperas en la romano ne nur kiel batalejo, sed kiel simbolo de duobla koloniado: la insulo suferis sub la japana militismo dum la milito, kaj sub la usona armeo post ĝi. La titolo — Naskitaj sur la ruino — sugestas, ke la vivo postmilita ne estas rekonstruo, sed la konstruo de io nova sur cindroj, sen iluzio pri restaŭrado.

Konkludo

Naskitaj sur la ruino montras ke ideoj estas facilaj, sed homoj estas komplikaj. Hamada Ikuo elektas fariĝi kaptito kun klara teorio pri demokratio kaj socialismo, kaj venas el tiu sperto kun opinio malpli klara, sed pli vera. La romano ne luktas por la emocioj de sia leganto per sentimentalismo, sed per honesteco, inkluzive de la nekutima honesteco, ke la ĉefpersono mem ne estas heroo, sed homo kun kompromisoj, malfortoj kaj nesolvitaj kontraŭdiroj. Tio estas ĝia literatura valoro.

Ĝi estas grava verko en la Esperanta originala literaturo kaj pruvo, ke eblas verki en Esperanto pri la plej gravaj aferoj — ekzemple, kiel resti homa kiam brulas la ĉirkaŭa mondo. Mi rekomendas ĝin al ĉiu, kiu interesiĝas pri la riĉeco de la Esperanta originala literaturo, aŭ pri verkoj kiuj esploras la homecon en strecaj, postulaj cirkonstancoj.

Ĝi estas, tutsimple, neforgesebla.

Inter algoritmoj kaj homoj: kiel KEA repensas sian komunikadon



De Garry Evans
Kebekio

En epoko dominata de sociaj retoj, algoritmoj kaj artefarita intelekto, la demando pri vera komunikado fariĝas ĉiam pli akra. Kion signifas “atingi homojn”? Kaj kiel malgranda, sed pasia lingva komunumo kiel la kanada Esperanto-movado povas resti videbla — kaj vivanta?
Tiuj demandoj staris en la kerno de la strategia laborgrupo organizita de la Kanada Esperanto-Asocio (KEA) la 21-an de marto 2026. Sub la gvido de Heather Eason — komunikad-profesiulo el Kardifo kaj fondinto de la firmao “Sprig of Heather” — dek unu aktivuloj kunvenis por ne nur diskuti, sed ankaŭ reimagi la estontecon de la movado en Kanado.
Jam de la unuaj minutoj evidentiĝis, ke la sesio ne estos simpla teoria prelego. Ĝi fariĝis viva laboratorio de ideoj, kie ĉiu partoprenanto kontribuis per sia propra sperto. La celo ne estis trovi “perfektan strategion”, sed kompreni ion pli fundamentan: kio vere allogas homojn al Esperanto — kaj kio igas ilin resti?

Kial ni estas ĉi tie?

Du demandoj, prezentitaj komence de la sesio funkciis kiel spegulo por la tuta grupo: kial vi lernis Esperanton? Kaj kial vi restas?
La respondoj estis konataj — sed samtempe revelaciaj. Multaj komencis pro lingva intereso aŭ ideala ideo pri neŭtrala internacia komunikado. Sed tio ne estis la kialo, pro kiu ili restis. Ili restis pro la homoj.
Pro amikecoj. Pro renkontoj. Pro la sento esti parto de io pli granda ol simpla lingvo. Tiu komuna sperto rapide fariĝis centra ideo de la tuta laborsesio: Esperanto ne estas nur ilo — ĝi estas komunumo.
Kaj eble ĝuste tie kuŝas ĝia plej granda forto.

La silenta konkuranto: teknologio

Inter la plej pensigaj momentoj de la diskuto estis la komparo inter homa komunikado kaj moderna teknologio. Hodiaŭ eblas “paroli” kun algoritmoj, lerni lingvojn per aplikaĵoj, aŭ generi frazojn sen vera interago.
Sed ĉu tio sufiĉas?
La partoprenantoj preskaŭ unuanime konsentis: ne. Oni povas lerni vortojn per komputilo, sed ne vere komuniki. Oni povas praktiki frazojn, sed ne konstrui rilatojn.
En tiu kunteksto, Esperanto aperas kiel io preskaŭ kontraŭkultura: lingvo, kiu instigas realajn interhomajn kontaktojn. Lingvo, kiu invitas vin vojaĝi, renkonti, babili, erari kaj lerni — kune kun aliaj.
“Venu lerni kun homoj, ne kun algoritmoj” — tiu ideo povus fariĝi unu el la plej fortaj mesaĝoj de la movado.

Defioj kiuj ne plu povas esti ignorataj

Sed entuziasmo ne sufiĉas. La grupo klare identigis tri gravajn defiojn.
Unue, la malkreskanta membraro. En epoko kiam malpli da homoj aliĝas al formalaj organizaĵoj, la tradicia modelo de asocioj estas sub premo.
Due, limigitaj rimedoj. Estas pli da ideoj ol tempo kaj energio por realigi ilin. Tio signifas, ke necesas fari elektojn — foje malfacilajn.
Trie, kaj eble plej grave: malklara valoro. Kial aliĝi al KEA? Kion oni vere ricevas?
Tiu lasta demando ekigis viglan debaton. Ĉu oni aliĝas pro idealoj? Pro komunumo? Pro konkreta utilo? La respondo ne estis ununura — sed unu afero fariĝis klara: se la valoro ne estas komprenata, ĝi ne ekzistas en la okuloj de la publiko.

Tri publikoj, tri rakontoj

Por trakti tiujn defiojn, la sesio proponis simplan sed potencan kadron: pensi ne pri “la publiko” ĝenerale, sed pri tri malsamaj grupoj.
Unue, tiuj kiuj ankoraŭ ne parolas Esperanton. Por ili, la lingvo estas nekonata mondo. Oni ne konvinkos ilin per gramatikaj klarigoj aŭ abstraktaj idealoj. Oni devas rakonti historiojn — pri vojaĝoj, pri amikecoj, pri realaj spertoj.
Due, esperantistoj kiuj ne estas membroj de KEA. Ili jam konas la lingvon, sed ne vidas kial aliĝi. Ĉi tie la defio estas montri, ke ili jam estas parto de io — kaj ke membriĝo profundigas tiun partoprenon.
Trie, la nunaj membroj. Por ili, la demando estas ne “kial aliĝi?” sed “kial resti aktiva?” Ili bezonas senti, ke sia kontribuo gravas.
Tri grupoj — kaj tri malsamaj manieroj rakonti la saman historion.

De strategio al praktiko

Unu el la plej valoraj aspektoj de la laborsesio estis ĝia praktikeco. La diskuto ne restis teoria; ĝi kondukis al konkretaj proponoj.
Ekzemple: simpla sed disciplina plano por sociaj retoj. Tri afiŝoj semajne. Ĉiam je la sama horo. Ĉiu dediĉita al unu el la tri celgrupoj.
Ne temas pri “esti ĉie ĉiam”, sed pri esti konsekvenca.
La sesio ankaŭ proponis aron da klaraj komunikad-principoj: uzi bildojn, skribi simple, engaĝiĝi kun aliaj, kaj ĉiam alvoki al ago. Ne komplike — sed efike.

La mistero de algoritmoj — kaj kiel vivi kun ili

Kompreneble, neniu diskuto pri moderna komunikado povas ignori la rolon de algoritmoj. Ili decidas, kiujn mesaĝojn oni vidas — kaj kiuj perdiĝas.
Sed Heather Eason proponis surprizan konsilon: ne tro zorgi pri ili.

Algoritmoj konstante ŝanĝiĝas kaj restas parte neantaŭvideblaj. Anstataŭ provi “venki la sistemon”, pli utilas krei enhavon, kiu vere resonas kun homoj.
Alivorte: la plej bona strategio kontraŭ algoritmoj estas simple esti interesa, aŭtenta kaj homa.

Kion signifas sukceso?

Fine, la sesio revenis al fundamenta demando: kiel ni scias, ke ni sukcesas?
“Sciu kiel aspektas sukceso” — simpla frazo el la prezentado, sed kun profunda signifo. Ĉu temas pri pli da membroj? Pli da eventoj? Pli da lernantoj?
Sen klaraj celoj, eĉ la plej bona strategio restas sen direkto.

Pli ol plano — sinteno

Eble la plej grava rezulto de la laborgrupo ne estis specifa plano aŭ listo de taskoj. Ĝi estis ŝanĝiĝo de perspektivo.
Malpli paroli pri la lingvo mem — kaj pli simple uzi ĝin. Malpli konvinki — kaj pli inviti. Malpli prezenti strukturon — kaj pli montri vivon.
En mondo saturita de enhavo, homoj ne serĉas perfektajn mesaĝojn. Ili serĉas signifajn rilatojn.
Kaj ĝuste tion Esperanto povas oferti.
Vi povas rigardi registradon de la laborgrupo per tiu ĉi ligilo.

Lokaj kluboj



Esperanto en Saskaĉevano

De Bruce Arthur
Saskaĉevano

Mi (Bruce Arthur) ankoraŭ estas la sola membro de KEA en Saskaĉevano, sed mi verkas novaĵleteron (La Tersciuro) pri Esperanto en Saskaĉevano, kiun mi sendas retpoŝte al kelkaj homoj ekster la provinco. Jen por *Lumo* mi verkas mallongigitan raporton.

Mi faras iom por disvastigi Esperanton ĉi tie. Mi skribis leterojn al du aŭ tri asocioj. En decembro, antaŭ la naskiĝtago de d-ro Zamenhof, mi sendis retpoŝtaĵon al listo de saskaĉevananoj, kiuj antaŭe indikis intereson pri Esperanto. Mi raportis pri 2025 kaj mi provis konvinki legantojn ke Esperanto estas lerninda kaj uzinda. Sed ĝis nun, neniu reagis. Mi scias ke multaj Esperanto-kluboj kunsidas por festi la 15-an de Decembro. Ne estas klubo en Saskacxevano do mi kutime festas alie.

Andy en Halifakso organizas kumzikojn (renkontiĝojn per Zoom) por esperantistoj en Saskaĉevano kaj aliaj preriaj provincoj.

Du esperantistoj (David Yaki kaj Sherry Wells) veturis trans Saskaĉevano en majo kaj mi povis renkonti ilin. Ili multe interesiĝas pri reklamado. Ilia gastiganto en Reĝino invitis geamikojn al manĝo, kaj ni parolis pri Esperanto kun ili. David kolektis kontakt-informojn de iuj el ili. Kiam David kaj Sherry revenis en novembro, ili restis ĉe mia hejmo. Sherry estas unitariano, kaj ni iris al la unitaria preĝejo en Reĝino kaj ni parolis kun iuj pri Esperanto. Kiam ili revenos en aprilo ĉi-jare, ili faros prezenton en la preĝejo.

En februaro mi ĉeestis mult-lingvan koncerton, kaj mi klopodis reklami Esperanton. Mi parolis kun unu virino kiu interesiĝas, kvankam tro fruas por scii, ĉu ŝi efektive decidos lerni la lingvon.



Foto: Gabriel Picard



Foto: Frederic Bourbeau

Foto: Nathan Guan

Bonvenon al Granbeo (Granby)

De Normando Fleury
Kebekio

La Mez-kanada Renkontiĝo de Esperanto (MeKaRo) de 2026 okazas inter la 16-a kaj la 18-a de majo en Granbeo (Granby), bela kebekia urbo, ĉirkaŭ unu horon aŭte oriente de Montrealo. Normando Fleury skizas la historion kaj allogaĵojn de la urbo. Vi povas vidi pli da detaloj kaj aliĝi al Mekaro en la retejo **mekaro.ca**

En 2026, Granbeo fariĝas 167-jara kiel urbo. Sed vivis en la regiono, jam de jarcentoj, la abenakia nacio, kiu nomis la riveron Yamaska, 'tie kie kreskas junkoj'. La rivero dividas la urbon en du partojn.

Granbeo prenas sian nomon de grava figuro de la angla nobelaro, en ĉi tiu kazo John Manners, ankaŭ konata kiel la Markizo de Granby.

La nomo Granby mem supozeble estas de norena origino, gran signifas "abio" kaj by signifas "vilaĝo".

En 1792, lojalistoj el Usono ricevis la rajton setligi la tiel nomatajn orientajn kantonojn. La 29-an de januaro 1803, la Kebekia Plenuma Konsilio donis la komunumon Granby al kolonelo Henry Caldwell kaj liaj 97 kolegoj. La unua setlanto, kiu establis sin sur la nuna loko de la urbo, alvenis en 1813. Tio estis John Horner, kiu konstruis segejon ne malproksime de la rivero Yamaska.

Kun la tempo, oni evoluigis diversajn industriojn kiuj produktis cigaredojn, kaŭĉukon kaj teksaĵojn. Tamen, tiuj industrioj jam de jardekoj ne plu funkcias.

Ĉe la unua stacidomo de 1859, oni povis iri trajne al Montrealo ĝis 1951. Poste, oni demetis la fervojojn en 1990 kaj kreis biciklajn vojojn sur ili. Nuntempe, la regiono famas pro tiuj biciklaj vojoj, kiuj allogas milojn da biciklantoj jare.

Ampleksan hospitalon oni inaŭguris en 1945 kaj fondis bestĝardenon en 1953, kiu fariĝis fama en la provinco.

Granbeo situas duonvoje inter Montrealo kaj Ŝerbruko (Sherbrooke), atingebla per la aŭtoŝoseo 10 (elirejoj 68 kaj 74). La rivero Yamaska Norda, kiu nutras la lagon Boivin, fluas tra ĝia centro. La naturaj pejzaĝoj de ĉi tiu regiono karakteriziĝas per miksitaj arbaroj, agrikulturaj kampoj kaj marĉoj.

Granby fieras pri multaj parkoj kaj fontanoj ene de siaj limoj. Inter ili estas Daniel-Johnson Parko, Victoria Parko, Terry Fox Parko kaj Miner Parko. Lago Boivin kaj ĝiaj ĉirkaŭaj padoj estas tre ŝatata loko por natur-entuziasmuloj. La Natur-interpreta Centro de Lago Boivin (CINLB) estas organizo dediĉita al konservado de la teritorio, faŭno kaj flaŭro de lago Boivin.

Lastatempe, la urbo rapide kreskis al pli ol 70 mil loĝantoj.

Ne maltrafu la okazon malkovri Granbeon ĝuante esperantistan etoson en majo 2026. Vizitu la retejon mekaro.ca por vidi la programon kaj aliĝi. Via aliĝo antaŭ la 1-a de majo, helpos nian planadon kaj mendojn en diversaj lokoj. Bonvenon en granbea Esperantio!

VARIE ĉiam varias

De Garry Evans
Kebekio



La 20-an de marto 2026 okazis plia eldono de VARIE — la Virtuala Amerika Renkontiĝo Inter Esperantistoj — kiu jam fariĝis grava regula evento por la Esperanto-komunumo en la Amerikoj. Ekde sia komenco, en majo 2025, VARIE kunigas esperantistojn el diversaj landoj de la kontinento, kaj ankaŭ el aliaj mondopartoj, montrante en praktiko la vere universalan karakteron de nia lingvo.

VARIE okazas proksimume ĉiun duan monaton, kaj ĉiufoje ĝin organizas alia lando. Ĉi-foje la gastiganto estis Meksiko, pere de la Meksika Esperanto-Federacio (MEF), kun subteno de la Amerika Komisiono de UEA. La aranĝo denove okazis rete per Zoom, kio ebligis vastan partoprenon: en la plej aktiva momento aliĝis pli ol 60 homoj el Usono, Meksiko, Brazilo, Peruo, Kolombio, Venezuelo kaj ankaŭ rimarkinda nombro da kanadanoj.

Jam antaŭ la oficiala programo regis varma kaj amika etoso. Neformala babilado inter partoprenantoj rememorigis, ke tiaj renkontiĝoj ne nur temas pri prelegoj, sed ankaŭ pri la konstruado de komunumo. La kunvenon gvidis Victor Iván Sombra Argüelles, prezidanto de MEF, kiu certigis glatan kaj agrablan fluon de la programo.

La unua programero estis prelego de Miguel Zúñiga González, kasisto de MEF, pri la temo “Tro rapida moderna vivo”. Li traktis gravan kaj aktualan demandon: la psikologiaj sekvoj de konstanta premo esti produktema. Laŭ li, ekonomiaj kaj sociaj atendoj ofte devigas nin ignori la bezonon ripozi, kio povas negative influi nian mensan sanon. Por konkretigi la temon, li prezentis memtaksan teston pri simptomoj kiel sendormeco aŭ maltrankvilaj pensoj.

La diskuto poste tuŝis la demandon: kio efektive estas mensa sano? Interesaj kontribuoj venis ankaŭ de partoprenantoj, inter ili Rodrigo Ramírez el Kolombio, kiu anoncis planon krei retpaĝon pri medicino en Esperanto. La prelego ne nur informis, sed ankaŭ instigis al persona pripenso kaj zorgo pri bonfarto — temo ofte neglektata en nia ĉiutaga vivo.

Post la teoria parto sekvis muzika momento: Ulises Franco Pérez, nova sekretario de MEF, ĉarmis la ĉeestantojn per du kantoj, akompanante sin per gitaro. Li prezentis “Kisu min multe” kaj “La Llorona”, tradicia kanto ofte ligita al la Tago de la Mortintoj. Lia prezento alportis emocian dimension al la renkontiĝo kaj bone ilustris la riĉecon de meksika muzika kulturo.

Sekve Eduardo Trejo prezentis prelegon pri la historia kaj kultura fono de la Tago de la Mortintoj, unu el la plej konataj tradicioj de Meksiko. Li klarigis, ke tiu festo devenas el antaŭkolumbaj kulturoj, kiuj komprenis morton kiel naturan parton de la vivciklo. Poste ĝi kunfandiĝis kun katolikaj festoj kiel Ĉiuj Sanktuloj. Trejo aparte emfazis la diferencon inter ĉi tiu tradicio kaj Haloveno: dum ĉi-lasta estas pli distra kaj kostum-bazita, la Tago de la Mortintoj havas pli profundan, familian kaj spiritan signifon.

La prelego ankaŭ montris kiel humuro ludas rolon en la meksika sinteno al morto, ekzemple per poezio kaj satiraj tekstoj. Krome li atentigis pri la regiona diverseco de la festo kaj ĝiaj sociaj funkcioj, kiel plifortigo de familiaj ligoj kaj transdono de tradicioj.

La muzika etoso daŭris kun prezento de Hiram Garcia, prezidanto de la Esperanto-klubo en Gvadalaharo, kiu kantis “Ĝi ne eblas”, Esperantan version de konata pop-kant “It’s Impossible”, de Christina Aguilera. Tiaj artaj kontribuoj klare montras kiel Esperanto funkcias ne nur kiel komunikilo, sed ankaŭ kiel rimedo por kultura esprimo.

Fine, Victor Sombra prezentis superrigardon pri la agadoj kaj estontaj planoj de MEF. Li informis pri aktivaj kluboj en Meksikurbo kaj Gvadalaharo, kaj pri klopodoj vastigi la movadon al aliaj urboj. Inter la atingoj li menciis retan enkondukan kurson, kiun sukcese finis 19 lernantoj, kaj la organizadon de la 15-a landa kongreso en 2022.

Interesa iniciato estas la tiel nomata “verda apartamento” en Meksikurbo — renkontiĝejo, biblioteko kaj gastejo por vojaĝantaj esperantistoj. Tia projekto konkrete montras la gastaman spiriton de la movado.

Krome li anoncis la venontan Meksikan Kongreson de Esperanto, okazontan en Querétaro (Esperante Keretaro) de la 14-a ĝis la 16-a de novembro 2026, kun la temo “Meksiko en Mondaj Ŝanĝoj”. La evento promesas esti grava renkontpunkto por la regiona kaj internacia komunumo.

VARIE denove pruvis sian valoron kiel platformo por interŝanĝo, lernado kaj kultura riĉiĝo.

La registradon de VARIE vi povas spekti ĉi tie.

La sekva eldono estos organizata de Peruo sabaton la 27-an de Junio je la 19:00 Perua horzono (20:00 en Otavo). Sendube ĝi daŭrigos la tradicion de malferma, diversa kaj vigla Esperanto-komunumo tra la Amerikoj — kaj preter ili.



Esperanto en **Kanado**

En la lastaj numeroj de nia monata novaĵletero de KEA, *Lumeto*, kaj en posta retpoŝta interŝanĝo, furiozis debato pri kial Esperanto ne plu viglas en Kanado kaj ĝenerale. Malmultaj homoj partoprenas en eventoj, ĉu virtualaj, ĉu ĉeestaj. Ĉu Esperanto (aŭ almenaŭ la organizita movado) ekmortas? Ĉu partopreni en kongresoj kaj klubkunvenoj estas simple tro multekoste kaj tempopostule? Legu la komentojn ĉi-sube, kaj sendu al ni viajn opiniojn.



Komentoj de Yves Bellefeuille

Mi jes pensas ke Esperanto ekmortas, aŭ almenaŭ UEA bone imitas memmortigon. Mi ne havas solvon por tio. Mi provas regule partopreni la renkontiĝojn de nia loka grupo (kiu ankaŭ ŝajne ekmortas), sed mi havas malmulte da emo pri provincaj aŭ landaj aranĝoj.

Aŭ eble mi simple laciĝas; mi ja partoprenas en la movado de preskaŭ 50 jaroj.

Ŝajnas al mi ke eĉ la plej interesaj programeroj lacigas se ili ofte okazas. Mi ne scias kiom da homoj partoprenis la antaŭajn KVaK kaj similajn aranĝojn, sed se la nombro falas, laŭ mi tio nur signifas, ke homoj volas pli da variado.



Komentoj de James Bridge

Mi ĝenerale konsentas, ke Esperanto suferas malrapidan ekmortiĝon, sed mi ĉefe volas doni mian opinion pri la kaŭzo.

Miaopinie, surbaze de mia vidpunkto en norda Ontario, Esperanto estas tro multekosta por la plimulto da homoj. Tutcerte, oni rajtas senpage lerni Esperanton helpe de Duolingo aŭ Eklernu, sed lerninte la lingvon — kio sekve?

Necesas kaj mono kaj tempo por ĉeesti kongresojn kaj aliajn eventojn. La ĉiusemajnaj videokunvenoj povas portempe kontentigi parolantojn, sed post ne tro longa tempo fariĝas klare, ke la movado efektive okazas nur en grandaj urboj, kaj eĉ tiam nur en la plej grandaj, kutime ĉefaj urboj.

Dume, ĉio fariĝas pli kaj pli multekosta. Dungantoj ĉie ofertas nesufiĉe da mono kontraŭ tro da laboro, kaj penas limigi la rajton de laborantoj foresti de la laborloko.

Cetere, fine de la tago laborantoj estas tro lacaj kaj havas nek la energion nek la tempon por studi fremdan lingvon, kiu neniel materiale kontribuas al la ĉiutaga vivo.

Mi amas Esperanton kaj volas, ke pli da homoj ekkonu kaj ĝuu ĝin, sed kadre de la "piramido de bezonoj" de Maslow, nia afero troviĝas ĉe la plej supra, malgranda pinto de la piramido, kiun multaj homoj devas forlasi por plenumi pli bazajn bezonojn kaj simple vivteni sin kaj siajn familianojn.

Koncerne min, de pli ol 15 jaroj mi diras al mi: "Venontjare mi ĉeestos kongreson", aŭ: "Venontjare aperos eĉ unu alia esperantisto en mia urbo." Sed jaron post jaro, mi neniam sukcesis trovi sufiĉe da mono kaj tempo por vojaĝi ien ajn — nek por ĉeesti kongreson, nek eĉ por viziti familianojn aŭ ĝui ferion kun la edzino kaj infanoj. De pli ol 15 jaroj mi ne aŭdis eĉ la plej malgrandan flustreton pri novaj alvenintoj en la tuta regiono.

La interreto faras Esperantujon pli videbla al parolantoj tra la mondo, sed ne pli tuŝebla. Konkursoj, videokunvenoj, lecionoj kaj similaj eventoj rapide fariĝas senenhavaj.

Mi elkore volas renkonti eĉ unu alian personon en mia propra urbo, kun kiu mi povus verdumi, sed ju pli da tempo pasas, des pli malfacile estas subteni la dediĉon al lingvo, kies internacia koro estas preter la limoj de mia tempo kaj mono.

Mi amegas nian aferon, sed profunde malgajigas min la timo, ke por mi ĝi por ĉiam restos fora fantazio preter mia atingo. Mi ne scias, kiel ŝanĝi la situacion, ĉar miaopinie ĉio ĉi radikiĝas en la problemo, ke ĉiutaga vivo fariĝis tro multekosta kaj tempopostula por la plimulto da homoj (inkluzive min).

Nia afero multe gravas al mi, kaj negrave kiom da homoj lernas aŭ konas ĝin, Esperanto pliriĉigas mian vivon.

Mi ne scias, ĉu Esperanto suferas similan sorton en aliaj landoj. Eble ĝi estas tre vigla en Eŭropo, aŭ eble la ĉina esperantistaro estos la nova ondo — mi vere ne scias. Mi povas komenti nur surbaze de mia propra vidpunkto en norda Ontario.

Miaopinie, la korpo de Esperanto ŝajnas suferi malrapidan ekmortiĝon, ĉar la movado flankenĵetis ĝian animon. De longe mi taksas erara la emon de la ĉeforganizaĵoj deklari: "Esperanto estas nur lingvo, kaj ĉion alian elektas la parolantoj!"

Miaopinie, Esperantujo devus fiere ĉirkaŭbraki siajn homaranajn radikojn. Mi ne celas la homaranismon de la kreinto, sed la por-laborantajn, pac-amantajn kaj kontraŭfaŝismajn radikojn.

La korpo perdis sian animon. Ni, la parolantoj, devas trovi kaj reenkorpigi ĝin.



Kelkaj pensoj de Bob Williamson

Kiom ofte la averaĝa kanada esperantisto partoprenas esperantlingvajn renkontiĝojn? Laŭ mia sperto, malofte. Nur ses el preskaŭ 100 KEA-anoj ĉeestis la pasintan VARIE-on [en januaro]. Dum la novembra KVaK, neniam pli ol 35 homoj ĉeestis, pluraj el ili eksterlandanoj. Povas esti, ke homoj uzas aliajn komunikilojn (ekz. Diskordon ktp.) por renkontiĝi. Ĉu oni povus informi nin pri tio? Alie, kial la plejparto de KEA-anoj ne emas partopreni retajn renkontiĝojn? Ĉu oni timas pro malkapablo partopreni aŭ eĉ kompreni la diskutadon? Ĉu homoj estas tiom sinĝenaj aperi publike aŭ fari komentojn? Kial? Esperantistoj estas tiom amikemaj kaj akceptemaj homoj!

Pasintmonate ni petis vin plenigi enketilon pri kunvenoj kiel KVaK. Ni kore dankas tiujn 15, kiuj respondis. Tamen, 15 % estas malalta rezulto. Ŝajnas, ke 85 % de KEA-anoj tute ne interesiĝas pri kunvenoj, aŭ hezitas doni sian propran opinion pri la afero, aŭ eble ne kapablas doni sian atenton al la demandoj, aŭ eĉ ne legas nian novaĵleteron Lumeto. Unu respondis: “Ĝenerale mi trovas KVaK-on kaj similajn renkontiĝojn neinteresaj. Miaopinie tro da esperantistoj laboras por Esperanto, sed devus pli multe labori per Esperanto. Pli kaj pli ofte mi sentas, ke la tuta movado estas morteta.” Kiel respondi al tiu komento? Ĉu vi konsentas pri tiu opinio? Sen viaj intervenoj, oni tute ne povas scii, pri kio temas, aŭ kiel reagi kaj, espereble, pliboniĝi. Ni refoje petas vian helpon.
Mi havas fortan rekomendon al vi: ĉeestu pliajn kunvenojn! Se vi estas “eterna komencanto”, vi rajtas silenti kaj nur aŭskulti, se vi deziras. Vi rajtas stumbli en via uzado de la lingvo, ĝis kiam vi certe plibonigos vian lingvokapablon. Tiel ĉiuj el ni iam lernis la lingvon.

Ververaj Valoroj

Kunmetita interezo, la oka mirindaĵo de la mondo

De Luis Obando
Brita Kolumbio

Onidire, Einstein nomis la kunmetitan interezon la “Oka Mirindaĵo de la Mondo”, aserto verŝajne apokrifa sed spirite trafa. La kunmetita interezo ne estas nur financa koncepto, ĝi efektive estas naturforto, tiom neevitebla kiel gravito kaj tiom potenca kiel uragano. En mondo, kiu krias por tuja satiĝo, ĝi restas la lasta granda sekreto de pacienculoj, silenta motoro zumanta sub la bruo de la ĉiutaga muelado.

Kunmetita interezo estas esence geometria magio: mono naskas idojn, kiuj tuj kreskas por naski siajn proprajn idojn. Ĝi estas la neĝbulo vintre ruliĝanta laŭ montego, kolektante mason ĝis ĝi fariĝas lavango kapabla konstrui imperiojn. Sed strukture, ĝi funkcias kiel granda kosma filtrilo. Tekstas proverbo: la borsmerkato estas mon-transdonilo de senpacienculoj al pacienculoj. Ĝi impostas la urĝecon de tiuj, kiuj aĉetas per kredito, kaj tiun valoron flugigas rekte en la poŝojn de tiuj, kiuj pretas atendi.
Konsideru momente la simplan sumon de dek mil dolaroj, hodiaŭ, eble la tuta kosto de vojaĝo al eŭropa E-kongreso. Se ĉi tiun sumon vi enŝlosus en kutiman indeksan fonduson, kiu redonas historie jaran mezumon de 12%, kaj vi simple... malaperus, se vi lasus la mondon turniĝi, lasus vian hararon griziĝi, lasus viajn *Lumo-revuojn* akumuliĝi kaj lasus kvindek jarojn pasi sentuŝe eĉ cendon, vi ne revenus al viaj dek mil dolaroj. Vi raviĝus en Mirlando, vi malŝlosus trezorejon enhavantan preskaŭ tri milionojn, (2 890 022). Tiele vi neniel laboris, neniel ŝvitis, aldonis neniun novan kapitalon. La komenca semo estas malpli ol 0.4% de la fina rikolto, la resto estas neta tempa alĥemio, silenta, miriga rekompenco pro la disciplino ne ĝeni la miraklon.

Kaj jen, la kruela ironio de ĉi tiu matematika mirindaĵo. Por ‘investi kaj forgesi’ necesas la lukso de ne-bezonado. Riĉuloj estas la solaj vere kapablaj je tia amnezia ago, ili rajtigas sian kapitalon ‘kviete dormi’ dum jardekoj, ĉar iliaj ventroj hodiaŭ plenplenas. La malriĉuloj, batalantaj por la tuja digno de necesaj manĝo aŭ lupago, devas nepre interrompi la kunmetan procezon, manĝante la semojn antaŭ ol ili iam ajn povas fariĝi rikolto. Ŝajnas, ke la sistemo estas desegnita tiel, ke la morgaŭaj riĉuloj estas simple la hodiaŭj riĉuloj, kiuj havos la pacienc-on atendi.

Tamen, kiom ajn ni ribelus kontraŭ la maŝino, ni ne povus bojkoti la matematikon. La formulo ne atentas pri justeco, nur pri la tempo. Do, ni akceptu nian sorton. Ni sekvu ties regulojn kaj prenu ajnan sum(et)on, kiun ni povas ŝpari, kaj ni ĝin oferu al kunmetita intereza estaĵo. Ni plantas la arbon, kaj kontraŭ ĉia instinkto en niaj modernaj korpoj, ni rifuzas elfosi la semojn por vidi ĉu ili kreskas. Ni nian kontrolon fordonas, fidante, ke se ni atendos sufiĉe longe, la Tempo-dio iame favoros ankaŭ nin.





Foto: John Huang

Dek Tagoj en Toronto, Vivo en Esperantujo

De Lakuse, helpita de Teodoro DUBOIS kaj Kinen CARVALA

La suno, brilanta troe kaj varme
La trajno, veturiganta min urbocentren
La studentaj loĝejoj (nun loĝejoj nestudentaj), en kiuj troviĝas
Homoj, kaj ties timetaj vizaĝoj de antaŭĝojo en la koridoro

Tre helpa subvencio de la Kanada Esperanto-Asocio kaj kroma rabato de ESF ebligis min ĉeesti la Nord-Amerikan Someran Kursaron (NASK) kaj la Dulandan Kongreson en julio 2025. Ni pasigis dek tagojn en Toronto, en la indiĝena teritorio de "Unu Plado kun Unu Kulero." Eksterlandanoj ĉiam supozas, ke ĉiuj kanadanoj loĝas ĉi tie, sed mi sukcese evitis Toronton ĝis nun dum la 23 jaroj ekde mia naskiĝo. Jen mia unua fojo kaj en Toronto kaj en la dolĉaj brakoj de Esperantujo. Kiam mi antaŭe ĉeestis la Universalan Kongreson en Montrealo, mi tute ne kapablis lingve, do mia sperto estis limigita. Tiutempe, mi eĉ ne konsideris min esperantisto. En la tagoj, semajnoj kaj monatoj post mia foriro el Toronto, mi rimarkis, ke kiam iu ĵetas la vorton "Esperantisto!" en mian direkton, min forlasas ĉiu antaŭa evitemo.

Ĵenja Amis, kies prozodio riverinis ekbrile
Alekso Miller, kies konduteco frenezis task-orientite
Hans Becklin, kies arde nebonlingvismaj vortoj fakte ne celis akuzi adoltojn pri adultado Stela Besenyei-Merger, kies neserioza enkonduko de "Kanade Invade" eble tro similis al anoncoj de aktoro en la filmo, Home Alone 2

Miaj oreloj alkutimiĝis al Esperanto de ĉiu nivelo, de akĉentoj diverse internaciaj

En la plenplenaj horaro kaj koridoroj de la Dulanda Kongreso troviĝas prelegoj historiaj, prelegoj podkastaj, prelegetoj, prelegegoj, prelegoj partoprenaj, prelego mia (mi kaj amiko kune priprelegis Tokiponon, alian simplisman planlingvon). Du vesperaĵoj: la Arta Vespero proponis prezentaĵojn kulturajn, samtempe elpensatajn prezentaĵojn, muzikaĵojn, kaj la elstaran Jordon Zero-n, kiu staris por kontribui sian muziktalenton tiom ofte, ke ŝajne li preskaŭ neniam okupis sian seĝon. La prelegoj kaj prezentaĵoj interesis min. Sed mi verdire preferis esti aliloke en la kongresejo. Renkontiĝoj kun novaj interesaj homoj, amikiga babilado kaj aŭdaca klaĉado okazis pli ofte en la ripozejoj proksime al la dormĉambroj, en la vigla manĝejo, kaj en la sidejo tuj apud la prelegĉambroj mem. Kvankam mi trinkis eksterordinaran kvanton da kafo por plienergiĝi min, mi tamen bezonis tagdormeti. Tiel mi ofte fuĝis al mia ĉambro en la dek-unua etaĝo – oni rimarkas la urbegon tra la fenestro – por ripozi kaj reregi min mem. La solena malfermo kaj malsolena fermo, resumitaj per la kuriozaj diroj de Tonkin kaj la laŭdindaj dancmovoj de la Prezidanto de Esperanto-USA, ŝajnis okazi sinsekve. Je unu palpebrumo, subite ne eblas ankoraŭ forte teni la momenton, la mankon, nun, la memoron. Jen junuleco.

La klimatizo, bruanta troe kaj malvarme
La stampfo, 've!'ante la akuzativon ĝuste
La studenta manĝejo (nun nestudenta manĝejo), en kiu troviĝas
Manĝaĵoj malfrostigitaj matene, inkluzive de malsekaj fromaĝaj ovoj

Antaŭ la DLK okazis la Nord-Amerika Somera Kursaro kiu estis samloka sed pli intima kun malpli da homoj kaj da farendaĵoj. Instruado matene. Umado posttagmeze. Frenezado nokte.

Matene. Mi progresis en la kurso de progresantoj. Komence mi timis, ke tiu nivelo ne taŭgos por mi, sed fakte la lerna medio estis preskaŭ perfekta. Katalin Kováts sperte elektis temojn, kiuj unue savis la komencajn progresantojn de bazaj eraroj, kaj due – enkondukante ceterajn randajn esceptojn – allogis la atenton de tiuj pli altnivelaj. Absolute, mi atente lernis multajn aferojn en la lecionoj.

Posttagmeze. Ni malsidiĝis, tagmanĝis, eliris el la lernejo, kaj vizitis diversajn partojn de la urbo. Inter paŝoj kaj transiroj (busaj/tramaj/metroaj), la lecionoj de la antaŭaj matenoj tremis maltrankvile en mia buŝo. Kelkaj eroj el mia memoro: la plej eta kaj malmultekosta manĝetaĵo en la plej multekosta bazaro St Lawrence Market, unu muzeo de tri ĉambroj, unu muzeo de tricent ĉambroj, la eterna ŝtupararo de Casa Loma, la ŝtonplena strando.

Nokte. La "pubo" estis la nokta rifuĝejo. En Esperantujo, mi trinkis mian unuan drinkaĵon kiel juna plenkreskulo. Ĝi kostis 20 dolarojn kaj gustis kiel stomaka acido; malpli dolĉa ol mi taksis ĝin de ĝiaj belaj ruĝ-oranĝ-viol-koloroj. Ĝi transportis min krepusken. Ve, tiu unua drinko estu mia lasta!

Malkiel multaj de miaj samkursanoj, mi ne pasigis la lastan tagon de NASK enprizonigite de la KER-ekzamenoj. Anstataŭe, kiam nia instruisto okupiĝis pri la ekzamenoj, la ne-ekzamenatoj de mia kurso kuregis ĉirkaŭ la urbocentro kaj kondutis vere strange por gajni poentojn en ruza kaŝludo organizita de Hans Becklin. Ni fotis kelkajn hazardajn verdajn stelojn, manĝis Kanadajn terpomfingrojn saŭcitajn pli rapide ol ni kapablis gusti, perforte vestis senkulpan ĉarmegan hundidon per ĉapelo, ktp.

La unua tago de NASK, mi nur iomete parolis pro manko de memfido. Je la fino de tiuj karaj dek tagoj, trarigardante la dancan rondon dum la malsolena fermo de la DLK, sopiro forte kaptis min. Mi konfesis al la nova amiko starante apud mi: "Mi ŝatus babili kun vi post la kongreso. Vi mesaĝu min." Li fakte mesaĝis, mi respondis, kaj la babilado dauris. Je la komenco de 2026, mi vizitis lin en Usono.

Mia urbo, Vinipego, ne havas lokan klubon. Onidire, la unua kanada Esperanto-klubo ekster Kebekio estis fondita en Vinipego en 1905. La nomoj de la kluba prezidanto kaj sekretario eĉ aperas en La adresaro de fruaj Esperantistoj eldonita de Zamennhof mem. Sed la Esperanto Society of Winnipeg ne longe dauris post la morto de la fondinto. Denove, kelkaj membroj provis starigi la novan klubon, la Esperanto Society of Manitoba klubon, in 1924. Kvardek jarojn poste, en 1964, iu reklamis unufoje novan vesperan kurson de Esperanto en la gazeto, Winnipeg Free Press. Post tiu reklamo, la kluba historio silentas.

Kreskis en Vinipego kelkaj rimarkindaj individuaj esperantistoj. Inter ili, mia atento fiksiĝas je Mateo Rankino. Li estas la reĝisoro de Universal Language (2024), filmo kiun la National Board of Review de Novjorko nomis "unu el la kvar plej elstaraj internaciaj filmoj de 2024." En Universal Language, Rankino montras rekoneblan sed fantazian Vinipegon, kie la ĉeflingvo estas la persa. La mola mallongeco de memoro, la senĉesa serĉado de identeco, kaj la universala bezono de homa proksimeco estas gravaj temoj en la verko. Sed, malgraŭ la nomo de la filmo kaj la esperantisteco de Rankino, la verko fakte ne temas pri Esperanto.

Ĉu estas simple hazardo, ke mi kaj Rankino studis ĉe la sama gimnazio?

Antaŭ NASK kaj DLK, mia Esperantujo troviĝis tie ĉi, en la arĥivoj de malnovaj gazetoj, en la sukceso de Rankino, sed precipe en la guglado de "Esperanto" "Winnipeg". Post julio de 2025, mi ne plu guglas tiel. La ŝanĝiĝo bezonis nur unu kongreson. Mi estas esperantisto, ligata al mia Esperantujo: la karaj rilatoj kiujn mi ekkovris en Toronto.



Foto: John Huang

Intervjuoj

Renkontu Irène Ellenberger

Intervjuita de Ĵenja Amis

Mi konatiĝis kun Irène Ellenberger en aŭtuno 2022, kiam ŝi venis al nia montreala renkontiĝejo - Resto Végo - kun unu el la kajeroj de sia patro, Henri Ellenberger, monde konata psikiatro. Ekde tiu tempo ŝi estas ne nur unu el motoroj de la Projekto Ellenberger, sed aktiva partoprenanto de la montrealaj kunvenoj. Irène estas admirinda ne nur ĉar ŝi komencis lerni Esperanton je la aĝo de 81 (!). Ŝi ne nur legis, sed ankaŭ faris (kaj daŭre faras) detalajn notojn al la kajeroj. Mi admiras Irène pro ŝia kuraĝo lanĉi sin en novan lingvon, ŝia persistemo, bonhumoro kaj amikemo. Irène naskiĝis en Svislando en 1942, post kiam ŝia familio sukcesis eskapi el nazia Francio al Svislando kaj stabiligi sian vivon. Dum mi legis diversajn kajerojn de Henri, mi vidis ŝin per la okuloj de ŝia patro jen kiel ĉarman infaneton jen kiel ribelan adoleskanton kun forta karaktero, plurajn kajerojn poste. Kiel infano, ŝi renkontis Karl Jung kaj diversajn aliajn famulojn, dank'al la konatiĝoj de sia patro.

Saluton, Irène, kaj dankon pro la konsento intervjuiĝi! Rakontu al ni pri viaj infanaj memoroj en Svislando! Kiel ĝi sentiĝis, kreski en la familio de psikiatro? Laŭ mia kompreno, vi loĝis en la aparta parto de psikiatria hospitalo, kie laboris via patro? Ĉu vi kaj viaj gefratoj -- kaj viaj gepatroj -- estis feliĉaj en Svislando?

Mi havis feliĉan sed tre izolitan fruan infanaĝon. Mi naskiĝis en Berno, unu jaron post la fuĝo el Francio de miaj gepatroj, miaj fratoj kaj mia fratino; mi do estas la plej juna el la infanoj. En 1944 mia patro komencis labori en Breitenau, la psikiatria hospitalo de la kantono Ŝafhaŭzo, en germanlingva Svislando. En tiu epoko estis kutime, ke psikiatroj kaj iliaj familioj loĝu en la hospitalo, foje en aparta pavilono kaj foje, kiel en Breitenau, rekte en la hospitalo. En nia kazo, la pordo de nia apartamento estis ĉe la fino de la vira alo kaj kondukis rekte al la ĉambro kie la pacientoj vestis kaj senvestis sin matene kaj vespere, la pordoj de nia apartamento tiam estante ŝlositaj kaj kurtenitaj. La pordoj de la konstruaĵo ĉiam estis duoble ŝlositaj kaj flegistoj devis malfermi la pordojn por ni per siaj ŝlosiloj kiam ni iris al la lernejo.
Ni estis en kontakto kun kelkaj pacientoj; mi eĉ havis la permeson ludi kun kelkaj el ili. Ĉar la hospitala tereno estis tre granda, ĝi estis preskaŭ urbo en la urbo, pacientoj estis videblaj ĉie. Ili laboris en la kampoj, la fruktoplantejoj, ili prizorgis la bibliotekon, alportis la manĝojn. Unu paciento eĉ faris la purigadon en nia apartamento.
Ĉar tio estis la sola medio kiun mi konis, ĉar mi ne havis kontaktojn kun aliaj infanoj de mia aĝo kaj ĉar miaj fratoj kaj mia fratino estis multe pli aĝaj ol mi, mi havis sufiĉe solecan infanaĝon. Krome ni parolis france hejme, en urbo kie oni parolis la svisgermanan dialekton kaj la germanan lingvon, lingvon kiun nia patrino neniam povis lerni. Mi lernis la germanan kiam mi komencis la lernejon, kaj mi rapide komprenis ke multaj samklasanoj neniam volis veni al mia hejmo. Mi kredas ke tio estis multe pli malfacila por miaj fratoj kaj mia fratino, kiuj estis pli aĝaj kaj devis senti sin marĝenigitaj.

Kion via patro diris al vi pri Esperanto? Ĉu lin foje vizitis esperantistoj kaj ĉu foje li vizitis aliajn esperantistojn?

Nia patro ofte parolis pri Esperanto kaj rakontis al ni anekdotojn pri ĝia uzado. Li rakontis al ni ke en Rusio iam estis esperantista interpretisto en ĉiu stacidomo. Por li Esperanto estis la plej bela el la konstruitaj lingvoj kiel Volapük kaj Interlingua, pro siaj literaturaj kvalitoj, ĉar oni povis verki poezion en tiu lingvo. Li ankaŭ parolis al ni pri Zamenhof kaj liaj idealoj.
Li rakontis al ni ke li foje renkontis esperantistojn dum siaj vojaĝoj kaj povis esti gastigita ĉe ili, kaj ke ekzistis esperantistaj centroj aŭ kafejoj en pluraj urboj. Li vizitis la Muzeon de Esperanto en Vieno kaj konservis bildkartojn de ĝi.
Bedaŭrinde mi neniam demandis lin kial kaj kie li lernis Esperanton; ankaŭ mia frato André tion ne scias.

Rakontu pri la epizodo kun Karl Jung, kiu venis viziti vian patron. Ĉu estis aliaj famuloj, kiuj vizitis vin?
Multaj famaj psikiatroj aŭ psikologoj vizitis nin. Mi memoras ĉarman maljunan sinjoron kiu alportis skatolon da ĉokoladoj, rarajon en la jaroj post la milito; mia frato poste diris al mi ke temis pri Jung.
Unu el la vizitoj de Léopold Szondi restis fama en la familio. Mia patro kunlaboris kun li por taksi ĉu lia testo povus esti uzata kun infanoj. Mi do trapasis tiun teston kelkajn fojojn kun mia patro kaj faris version por mia plusa urso kaj mia pupo. Do mi sidis sub la manĝotablo kaj faris tiun teston al miaj ludiloj; mi devis esti ĉirkaŭ kvinjara, kiam sinjoro Szondi alvenis. Mia patrino enkondukis lin en la manĝoĉambron atendante la alvenon de mia patro, kaj li malkovris knabineton kiu ludis sub la tablo. Li demandis min per kio mi ludis kaj mi klarigis al li ke mi faras la teston de Szondi al mia pupo.



1914 (proks. 9-jara)

Laŭ lia peto mi klarigis al li el kio konsistas la testo, montris al li la tabulojn kiujn mi desegnis kaj eĉ la foliojn por interpreti la rezultojn kiujn mi reproduktis laŭ mia maniero. Ne necesas rakonti lian ĝojon kaj la laŭdajn komentojn kiujn li faris pri mi al mia patro.

Ĉu vi ĉiam sciis pri la ekzisto de la intimaj



La Ellenberger-familio en Afriko

kajeroj de via patro? Se jes, ĉu vi aŭ viaj gefratoj iam volis legi ilin, dum via patro estis viva, se vi sciis pri ili?
Mi malkovris la ekziston de la intimaj kajeroj de mia patro ĉirkaŭ la aĝo de 15 jaroj; mi malfermis unu kaj vidis ke ili estis skribitaj en Esperanto. Sed nur kiam mi inventaris kaj pakis la arkivojn de mia patro por sendi ilin al Parizo mi komprenis ke estis tiom da kajeroj kaj kiom grava tiu taglibro estis por li. Sed mia patro tiam ankoraŭ vivis kaj mi havis aliajn zorgojn. Mi ankaŭ sciis ke li metis embargon pri la aliro al sia taglibro.

Ĉu la legado de kajeroj malfermis novan vidon al via patro? Ĉu vi sentas ke via vido de li estas sama nun kiel ĝi estis aŭ ĉu ĝi ŝanĝiĝis? Ĉu estas iuj apartaj surprizoj, post la legado de liaj kajeroj?

La legado de la taglibro de mia patro tute ŝanĝis la percepton kiun mi havis pri li. Dum mi konsideris lin sufiĉe rezervita kaj modesta viro, preskaŭ neniam parolanta pri siaj personaj sentoj, mi malkovris senteman homon, plenan je vivo, ofte dubantan pri si mem sed dezirantan esti rekonata laŭ la nivelo de siaj talentoj. Foje kolerema, kun kompleksa karaktero kaj havinta sufiĉe deliktan infanaĝon kun multaj konfliktoj kun siaj gepatroj. Mi rimarkis ke mi havis multe pli da komunaj punktoj kun li ol mi pensis.
Mi evidente malkovris multajn aferojn pri la geedza vivo de miaj gepatroj, verŝajne pli ol tion kion mi volis scii... Sed mi sciis ke mia patro elektis deponi sian taglibron en sia arkiva fonduso, kun embargo, kaj ke li do konsentis pri la diskonigo de ĝia enhavo, inkluzive al la membroj de sia familio. Male al mia patrino, kiu ankaŭ sporade verkis taglibron kaj kiu petis ke ĝi estu detruita post ŝia morto, kion mia fratino kaj mi faris.

Vi lernis Esperanton speciale por povi legi la kajerojn de via patro. Mi tre esperas, ke vi ankaŭ trovis komunumon kaj amikojn dumvoje. Ĉu vi sentas, ke vi estas esperantisto -- kaj ĉu vi sentas ke via patro estis esperantisto, aŭ ĉu estus pli ĝuste diri "esperanto-parolanto", ne nepre ankrita kun la Esperanta komunumo?

Mi lernis Esperanton malfrue; mi komencis ĉe Duolingo kiam mi havis 81 jarojn. Mi bedaŭras ne esti lerninta ĝin pli frue; la lernado estus estinta malpli peniga. Kvankam mi povas ĝin facile legi, mi emas blokiĝi ĉe la parolata lingvo. Sed mi kun plezuro malkovris esperantistan komunumon en Montrealo konsistantan el interesaj homoj. Mi tie akiris amikojn; mi provas sekvi iliajn agadojn kaj aprezas la intereson kiun ili montras pri la taglibro de mia patro kaj ilian engaĝiĝon en la projekto Ellenberger. Sen ili mi verŝajne ankoraŭ serĉus solvojn por konatigi la taglibron de mia patro.
Koncerne mian patron, mi ne scias ĉu li sentis sin esperantisto, sed mi pensas ke li estis pli ol nur parolanto de Esperanto. Li havis plurajn librojn en Esperanto en sia biblioteko; li foje iris al esperantistaj kafejoj dum siaj vojaĝoj; li konservis fotojn de la muzeo de Esperanto en Vieno.



Henri Ellenberger kaj Irène, 1949

La rakonto de Irène ne finiĝas ĉi tie! En la plena versio de ĉi tiu intervjuo, ŝi rakontas al ni pri siaj ribelemaj adoleskaj jaroj, sia translokiĝo al Kanado, kaj kiel ŝi fariĝis la unua prezidantino de sia sindikata konsilio.
Legu la plenan intervjuon en nia retejo esperanto.ca



BONVENON AL GRANBEO

De la 16-a ĝis la 18-a de majo 2026

Foto: Quebec Vacances